

B. LAVRENEV

# DISROMPO

LAŮ ORIGINALA RUSA  
MANUSKRIPTO TRADUKITA DE  
HELENA SAZONOVA

„E K R E L O“  
L E I P Z I G 1931

## ANTAŬPAROLO

La rusa postrevolucia literaturo estas karkterizata per abundaj provoj diversflanke respugli diversajn momentojn el la revoluci-tempa travivitaĵo.

Tiuj provoj ofte kondukas al kreo de literaturaĵoj, havantaj ne nur limigite ruse-nacian, sed ĝeneralan tuthoman valoron.

Prezentante sub formo literatura certajn epizodojn el la giganta interlukto de sociklasoj, — tiuj verkoj vekas ĉe siaj legantoj novajn ideojn, donas al ili novajn impulsojn por kompreni la okazinton kaj la okazanton.

Rakontante pri transira epoko, kiam la proletaro forprenis la potencon de la plifruce regantaj sociklasoj, tiuj verkoj servas kiel grava historia dokumento pri psikologio, pri agomotivoj de klasoj kaj de individuoj dum tiu periodo.

Ĉiuj-ĉi kaŭzoj klarigas, kial la moderna rusa literaturo ĝuas vastan akcepton kaj intereson ankaŭ en eksterlando.

Por konatigi la esperantajn legantojn kun verko el tiu spaco—estis elektita nenie presita dramo «Disrompo», prezentanta tre koncentrigitan resumon el samnoma romano, resumon, faritan de la romanaŭtoro mem—Boriso Lavrenev, moderna rusa verkisto. Koncentrigiteco de l'agado faras tiun dramon feliĉe eĉ pli interese legebla ol la romano mem. En rusa lingvo tiu dramo dum tri jaroj ne lasis la teatro-scenejojn diversurbajn. Espereble ankaŭ ĉe esperantistoj tiu verko trovos konforman favoran akcepton.

Por ke tiu dramo estu bone komprenita de eksterlandaj legantoj, ne ĉiam sufiĉe konantaj la historion de rusa revolucio, — necesas doni al ĝi malgrandan informan enkondukon. Naŭ specialaj klarigoj, pri kiuj troviĝas ciferaĵoj notoj en la teksto de la dramo, estas en tiu enkonduko montritaj per la samaj etpresitaj ciferoj.

La dramo de B. Lavrenev provas respugli finalan periodon de partopreno de carista militŝiparo en la revolucio de la j. 1917, kiu finkondukis al starigo de sovetia potenco.

En la cara militŝiparo estis reprezentitaj ĉiuj fortoj, kiuj antaŭenpuŝis la revoluciojn kaj difinis ĝian evoluon.

La oficiraro de la militŝiparo estis varbata ekskluzive el nobelularo. Aliuloj ne estis eĉ akceptataj en la maristajn militlernejojn. La ŝipanaro, relative pli klera, pli instruita, ol la soldatoj de la cara terarmeo—

estis elektata certaparte el la urhologantoj, laboristoj, metiistoj ktp. Guste en tiuj tavoloj ĉiam ekzistis pli fortaj revoluciaj tendencoj. Por teni tiun ŝipanaron en stato obeema — estis lerte uzata institucio de longdaŭre militservantaj suboficiroj, boatistoj <sup>4</sup> kaj konduktoroj, <sup>5</sup> kiuj estis elektataj inter plej fidindaj — de oficira vidpunkto — ŝipanoj kaj kiujn oni salajris multe pli bone ol simplajn ŝipanojn.

La revolucia spirito estis tre forta en la ŝipnaro. Jam en la j. 1905 — dum la unua rusia revolucio — ribeloj de ŝipanoj okazis same en Balta kaj en Nigra Maro. Speciale minaca estis por carismo la ribelo de kirasŝipo «Princo Potemkin» <sup>6</sup> en la Nigra Maro. Nur ne ricevinte subtenon de aliaj militŝipoj «Princo Potemkin» estis devigita foriri Rumanion kaj tie doni sin al bonvolo de la rumana registaro.

La ribeloj inter ŝipanoj dum la j. 1905—1906 estis subpremitaj de la cara registaro plej senindulge. Multaj estis mortigitaj kaj dronigitaj, ĉu laŭ verdikto de milittribunalo, ĉu eĉ sen interveno de iu ajn tribunalo.

Post la jaro 1907 — por eviti ripetigon de similaj ribeloj la cara registaro speciale atentis la ŝipanaron kaj speciale persekutis ĉe ĝi iun ajn elmontron de liberemo. Rilatoj inter la oficiraro kaj la mobilizata ŝipnaro fariĝis ankoraŭ pli streĉaj.

Rezulte, kiam en la marto 1917 eksplodis la nova revolucio en Petrogrado, la ŝipanoj plej aktive ĝin partoprenis. En Kronŝtadto — milita haveno, gardanta Petrogradon de la flanko de Finna golfo — dum daŭro de kelkaj horoj estis forigita la tuta potenco de la carista oficiraro. Multaj oficiroj estis mortigitaj. Kronŝtadto, estrata de la ŝipanoj, fariĝis de la unuaj tagoj de la marta revolucio mem — citadelo por maldekstraj revolucianoj kaj por bolŝevikoj (komunistoj). Restis vivaj kaj ne arestitaj nur tiuj oficiroj kaj oficistoj de la cara epoko, kiuj sukcesis iel gajni por si la simpatiojn de la ribelinta ŝipnaro. La samo, kiel en Kronŝtadto, ripetigis ankaŭ en Helsingfors, la dua marstacio de la Balta-mara ŝiparo.

Iom pli trankvile la transiro de la potenco al la revoluciaj amasoj efektiviĝis en la Nigra-mara ŝiparo, kiun komandis admiralo Kolĉak — pli poste en la j. 1919 unu el la ĉefaj kontraŭrevoluciaj batalantoj en Siberio. Tamen ankaŭ tie, same kiel en la Balta-mara ŝiparo, la tuta agado de restintaj oficiroj estis zorge kontrolata de specialaj elektitaj ŝipan-komitatoj <sup>1</sup>. Similaj komitatoj estis kreitaj por kontroli ankaŭ la agadon de la ĉefaj stahoj. En la Balta-mara ŝiparo tiun funkcion plenumis Centrobalt <sup>2</sup>.

Post falo de cara registaro en la marto 1917 fakte la potenco venis al manoj de et-burĝa partio de socialistoj-revolucianoj <sup>3</sup>, kiuj formis plimulton en la provizora registaro kaj en la Unua komenca konsisto de la Centra Ekzekutivo de Sovetoj.

Prezidanto de la provizora registaro estis fama multeparolanta Kerenskij. Sed la amasoj rapide akceptis pli maldekstrajn ideojn de bolŝevikoj. Tion bone helpis ankaŭ la daŭranta milito kaj la ĝenerala malboniĝo de la ekonomia situacio. Jam en aprilo 1917, veninta el eksterlando

Rusion, Lenin proklamis novan lozungon, ke la tuta registara povo estu transdonita al sovetoj, kiel al instrumentoj de proleta diktaturo. En majo kaj poste en julio 1917 la amasoj elmontris siajn simpatiojn al tia celado. En Petrogrado okazis vastaj demonstracioj, postulantaj forigon de la provizora registaro. Tiun demonstracion partoprenis ankaŭ revoluciaj ŝipanoj, venintaj el Kronŝtadto <sup>3</sup>.

La provizora registaro, subtenata de junkroj — lernantoj de militlernejoj kaj de kozakoj, sukcesis tiutemp subpremi la movadon. La demonstracio estis pufe dispolita sur angulo de stratoj Nevskij kaj Sadovaja. Plian subtenon al la registaro donis vokitaj de batalfronto regimentoj, troviĝintaj sub influo de socialistoj-revolucianoj.

Tamen tiu subpremo de plua ribelemo nur naskis novajn revoluciajn fortojn en la amso.

Ĝis tiu tempo la Nigra-mara ŝiparo povis esti konsiderata kiel subtenanta la provizoran registaron. El inter vicoj de ĝiaj ŝipanoj estis varbatataj propagandistoj, kiuj alvokis ankaŭ aliajn ŝipanojn kaj soldatojn subteni la provizoran registaron <sup>4</sup>. Sed la amaso mem — eĉ inter la Nigra-mara ŝipanaro rapide revoluciigis. Baldaŭ okazis novaj elpaŝoj. La oficiraro de Nigra-mara ŝiparo estis senarmigita. Kontraŭstarintoj estis mortigitaj. Ne mankis ankaŭ krudaj eksceso <sup>5</sup>. Kolčak lasis komandon de la Nigra-mara ŝiparo.

Simila situacio en la tuta lando rapide kondukis al efektivigo de Soveta potenco. Kiam la 7/XI—17 estis likvidita la provizora registaro, gravan rolon ludis la Balta-mara ŝipanaro ĝenerale kaj speciale — la ŝipanoj de krozŝipo «Aŭroro», kiu venis el Kronŝtadto al Petrogrado kaj per siaj kanonoj minacis al la sidejo de la provizora registaro — la cara «Vintra palaco».

La dramo de B. Lavrenev prezentas ĝuste tiun lastan periodon, antaŭirintan la oktobran sovetan revolucion — sur la krozŝipo «Aŭroro». La finala epizodo de la dramo montras foriron de la ŝipo al Petrogrado por partopreni la bolŝevikan revolucion.

E. D r e z e n

Kislovodsk.

11/VI—30.

---

## PERSONOJ

GODUN ARTEM — Prezidanto de ŝipana komitato <sup>1</sup> sur krozŝipo «Aŭ-  
rora» — 32 jara.

BERSENEV Eŭgeno Ivanoviĉ — kapitano, komandanto de krozŝipo —  
53 jara.

SOFJA PETROVNA — lia edzino.

TATJANA — 26 jara, vestita kiel ruĝfratolino } iliaj filinoj

KSENJA — 20 jara, ekscentrkonduta, junulino }

FON-ŠTUBE — Leopoldo Teodoroviĉ, leŭtenanto, edzo de Tatjana —  
30 jara.

KOLONELO JARCEV } membroj de la Komitato por  
LEŬTENANTO POLEVOJ } defendo de patrio kaj libero.

JEREMEEV }  
ŠVAC } boatistoj de krozŝipo.

1-a GARDESTRO.

2-a GARDESTRO.

1-a SUBLEŬTENANTO.

2-a SUBLEŬTENANTO.

ŜIPANOJ: 1-a, 2-a, 3-a, 4-a, 5-a, 6-a.

MALJUNA ŜIPANO.

1-a GARDOSTARANTO.

2-a GARDOSTARANTO.

RADIISTO.

MILICIN — admiralo.

USPENSKIJ — membro de CK de socialist-revolucia partio kaj de  
Centra Ekzekutivo de Sovetoj de la Unua Kuvoko.

Petr ĤVATKIN — ŝipano de Nigra Maro, — delegito.

PANOV — membro de Controbalt.

LA ĈAMBRISTINO de Bersenev.

ŜIPANOJ—AMASO.

La loko de agado estas apud peterburga milithavena urbo — Kron-  
ŝtadt; la tempo de agado estas Julio—Oktobro 1917 jaro.

## UNUA AKTO

Mangoĉambro en la loĝejo de la ŝipestro *Bersenev* en Kronŝtadto. Hela sunsubiranta vespero. Apud tablo aranĝita por teo sidas edzino de *Bersenev*, *Tatjana* kaj *Stube*.

Tra la larĝa fenestro vidiĝas flaviganta ĉielo kaj tegmentoj de la urbo.

*Stube* legas ĵurnalon «*Ruskoje Slovo*», *Berseneva* sidas apud samovaro kaj trikas telertukon.

**TATJANA** — (transdonante al la patrino malplenan tason) Panjo, donu al mi ankoraŭ unu faseton.

**BERSENEVA** — (parolas al *Stube*) Kaj vi, *Leo*, ĉu vi volas ankaŭ?  
(*Stube* legas ĵurnalon kaj ne aŭdas).

**TATJANA** — *Leo*, panjo parolas kun vi.

**STUBE** — Ha? Kion? Pardonu min.

**BERSENEVA** — Ĉu vi volas teon?

**STUBE** — Jes, mi petas. Pardonu min. Mi ne aŭdis, legante.

**BERSENEVA** — Ĉu ion interesan?

**STUBE** — Ho, jes, *Sofja Petrovna*. Ĉu vi memoras *Dombrovski*?

**BERSENEVA** — Kiun?

**STUBE** — La malpliagana. Aleĉjon. Tiun, kiu iomete amindumis kun *nia Ksenja*.

**BERSENEVA** — Nu jes. Tia helokula, ĉarma hubo. Mi tro bone memoras lin.

**STUBE** — Hm. Jen tiun-ĉi ĉarmnan bubon ebria ŝipanaraĉo en *Sebastopolo*<sup>2</sup> bruligis en la kaldronforno de drednaŭto. Vivantan. Post du horoj oni elprenis nur brulitajn ostojn.

**BERSENEVA** — Ho, mia Dio! (*Kovrinte* la vizaĝon apogas siajn ŝultrojn al la dorso de la seĝo).

**TATJANA** — *Leopoldo*. Vi scias, ja, ke panjo havas malsanan koron. Estas abomenaĵo. (*Stariĝas. Aliras al patrino kaj karesas ŝiajn ŝultrojn.*)

**STUBE** — Ĉu estas abomenaĵo — diri, ke oni forbruligis la homon en la kaldronforno — kaj ĉu fari tion ne estas abomenaĵo?

**TATJANA** — Panjo, ne estu nerva, ĉesu. jen trinku (donas al ŝi akvon).

**STUBE** — Kial vi ne respondas?

TATJANA — Dua abomenaĵe. Sed tie — ja okazis sovaĝa eksplodo de paŝioj, kaj ĉi-tie malzorga kaj maldelikata mokturmentado. STUBE — Dankon.

BERSENEVA — Tanjo, sed kial do? Pro kio? Kiakaŭze? Li ja havis patrino. Kiel ŝi tion elsuferos?

TATJANA — Pro kio, panjo? Neniu povas respondi tiun demandon. Unu pagis la krimojn de ĉiuj.

STUBE — Ĉu tion vi studis en la Virina Altlernejo?

TATJANA — Aŭskultu...

STUBE — (trinkante teon) Mi ensorbas la teon per buŝo kaj viajn parolojn per orelo...

TATJANA — Vi estas burleskulo.

STUBE — Indulgon! Mi? Burleskulo? Ĉu mi dancas burleske laŭ ordonoj de ŝipanoj, kiel kelkaj aliaj? Kial do mi estas burleskulo?

TATJANA — Kiu estas — tiuj-ĉi «kelkaj»? Kiun vi aludas?

STUBE — Neniun, neniun. Silenton, kiel parolis mia amiko Popriŝĉin.

BERSENEVA — Ne malpaciĝu. Mi volas, ke la hejmo ankoraŭ konservu almenaŭ ombro de paco kaj trankvilo. (Paŭzo) Sed Eŭgeno ankoraŭ ne venis. Kiakaŭze nur li forveturis? Eble... (paŭzo). Oni povas frenezigi pro tiu ĉi vivo sur la vulkano.

TATJANA — Ne ĝemploru, panjo. Kio do povas okazi kun la patro? Ne turmentu vin..

STUBE — (ironie) Sendube. Pri iu alia — eble, sed pri kapitano Bersenev ne penindas maltrankviliĝi. Li postvivos nin ĉiujn.

TATJANA — Kial tia tono?

STUBE — Dio mia. Kia vi estas nekomprenema hodiaŭ? Kial timi pri Eŭgeno Ivanoviĉ? Li vivas harmonie kun la gvidantoj de la ŝipanara respubliko. Sur la brakoj li portas ilin, kaj tiu-ĉi bandaĉo — reciproke lin. Reciproka politiko de adorado. Ĉu ne estas kortuŝe, ke kuraĝa kaj multmerita oficiro maras nunanmomente en Peterburgo kun la ŝipanaro, maĉas sunflorsemojn kaj krias: «for la registaron».

TATJANA — Povas esti, vi ripetos tiun-ĉi abomenaĵon al mia patro, aŭ vi ektimos kiel kutime?

STUBE — Mi ne estas malkuraĝulo. Malkuraĝuloj estas tiuj, kiuj pro timo obeas la bestaron, kiu rompis siajn kaĝojn. Malkuraĝuloj estas tiuj, kiuj kondukas kun la ribelinta ŝipanaro danĝeran kaj malhonestan «kamaradludon».

TATJANA — Kiel vi kuraĝas tiel paroli pri mia patro? Vi estas impertinentulo.

BERSENEVA — Tanjo. Leopoldo. Rekonsciĝu. Vi min entombigos.

STUBE — Estis ne mi, kiu komencis, Sofja Petrovna.

TATJANA — (ne aŭskultante) Ĉu vi volas scii, kiuj estas la malkuraĝuloj? Ĉu jes? Estas vi kaj viaj amikoj, kiuj forlasis la ŝipanojn tuj, kiam oni puŝis sur la pavan voston de via gvardia majesto. Vi ektimis pro sia felo kaj lasis la ŝipanojn — solaj en la ventego. Efektive, kuraĝuloj.

STUBE — Pava vosto?... felo?... Supozeble baldaŭ vi uzos ankoraŭ pli trafajn stratsinsultojn.

BERSENEVA — Leopoldo. Kion vi parolas? Vi frenezigas?

TATJANA — Jes mi uzos ilin, se vi tion meritos. Kaj ne pensu... (eksilentas kaj aŭskultas. De malproksime aŭdiĝas plifortiĝanta muziko kaj kanto. Tatjana kuras al la fenestro. Malfermas ĝin. En la ĉambron penetras la muziko kaj kanto —

«..... ni detruos  
Ĝis fundament' de l'tirani'  
Kaj novan mondon ni konstruos;  
Ne nuloj—ĉio estu ni.....»

TATJANA — (apud la fenestro) Ili revenis... revenis... gvardianoj... la ŝipano de la «Respubliko».. ha, jen, niaj... la patro... Godun...

Stube kaj Berseneva alvenas al la fenestro. La kantado proksimiĝas

«Por finlukto socia  
Ni grupiĝu en rond,  
Kaj la Internacio  
Triumfu en tutmondo!»

La plua interparolo inter Stube kaj Berseneva okazas dum la kantado daŭranta. Tatjana ne aŭskultas, ŝi salute svingas naztukon el la fenestro.

STUBE — Mirinda spektaklo. Konsejaj respublikanoj revenas post la vica skandalo. Kaj tiujn ĉi plenrajtajn civitanojn antaŭmarŝas hereda nobelo, oficiro de la rusa ŝiparo kaj mia bopatro, li marŝas manĉemene kun bandito kaj drinkulaĉo.

BERSENEVA — Leo, karulo, ne incitu Tanjon. Mi timas pro ŝi kaj pro vi. Ŝi estas nerve ekscitita. Mi ankaŭ ne ĉion komprenas en la aferoj de Eŭgeno, sed li obeas voĉon de sia konscienco. Kaj Tanjo senrezerve lin amas.

STUBE — Sed tio ne povas devigi min same senprudente kaj senpense adori Eŭgenon Ivanoviĉ. Ĉu voĉo de konscienco? Sed en kio? Ĉu en perfido de la oficiraro, de la ŝiparo, de Rusio? Ĉu en ilia fordono por frakaso kaj ekstermo?

BERSENEVA — Pensu, kion vi volas, sed ne incitu Tanjon. Kial vi prenas la rajton senrezerve mallaŭli la homon. Al mi estas pli malfacile ol al vi toleri tiun-ĉi katastrofon. Mi estas edukita laŭ malnovaj tradicioj, sed mi ne povas tiel senrezerve ion mallaŭli. Al mi ŝajnas, ke nuntempe ni elpagas iun forgesitan, malnovan kaj timindan ŝultlon.

STUBE — Hu, kiel ĉio-ĉi tediĝas al mi.

BERSENEVA — Ĉio venos finfine en ordon, Leo. Mi kredas al humaneco.

STUBE — Tie-ĉi necesas ne humaneco, sed necesas mitraljezoj.

BERSENEVA — Tio-ĉi estas malsaga kolero, Leo. Ĝi preiĝos vin kaj rompos Tanjon, sed mi tion ne volas (paŭzo). Mi iros kaj varnigos la samovaron. Eŭgeno sendube tre laciĝis kaj malsatas. (Foriras kun

la samovaro. Sur la strato mallaŭtigas la kanto. Tatjana scriras de la fenestro. Ŝtube baras la vojon kaj prenas ŝian mianon.)  
ŜTUBE — Tanjo...

(Tatjana silentas)

TATJANA — (ekrigardas liajn okulojn) Kion vi volas, Leo?

ŜTUBE — Tanjo, kial vi tiel ŝanĝiĝis? Kio estas kun vi? Por mi vi havas nek rideton, nek humanecan vorton. Vi traktas ofende min. Oni povas pensi, ke mi estas via senindulga malamiko.

TATJANA — (trankvile) Ankoraŭ ne.

ŜTUBE — Ĉu ankoraŭ?

TATJANA — Ha, Leopoldo, kion demandi? Ŝanĝiĝis vi, sed ne mi. Mi ne povas vin tielan vidi.

ŜTUBE — Kielan?

TATJANA — (malafable) Mizeran, vivan kadavron. Vi ĉesis vivi. Kiam mi ekamis vin, vi estis vivplena, firma, vi tenis la vivon en la manpugno, kaj nun vi estas malvivulo. Vi nenion plu sentas. (Arde) Ĉu efektive, Leopoldo, vi estas blinda kaj surda? Ĉu efektive vi ne sentas, ke la mondo nun odoras alie, ĉu vi ne vidas, ke ĝi bolas kaj muĝas? Povas esti, ke mi ne ĉion komprenas, sed ĉiutage mi sentas spiron de grandega kaj belega ventego. (Malĝoje) Kaj vi, vi poluras la ungojn, ŝanĝas la kolumojn, kaj, kuŝante sur la kanapo, vi senforte grumbblas kontraŭ la uragano. Vi ja estas maristo. Vi do devas ami uraganon.

ŜTUBE — Mi kutimis kaj amas renkonti uraganojn vestita per pura kolumo, — tia estas nia marista tradicio. Sed nun la lavistinoj estas okupitaj per la revolucio.

TATJANA — Kia mizera paradokso. Leo, Oskar Wilde fariĝas jam arkivaĵo. Vi ne povas tion kompreni, kaj en tio-ĉi estas via katastrofo. Vi estas nek ardanta, nek malarda, kaj la vivo elĵetas vin.

ŜTUBE — Kaj por vi tia vivo estas akceptebla? Senbridigaj devizoj, mortigoj, fivizaĝoj en la ŝelaĵo de la sunflorsemoj, ĝenerala, rekta, egala kaj evidenta malĝentilaĵo... hrrrr....

TATJANA — Kaj krom ĉi-tio vi nenion vidas?

ŜTUBE — Nenion.

TATJANA — Do vi estas kadavro, Leopoldo. Senbridecon, maldelikatecon kaj malĝentilecon mi vidas ne pli malbone ol vi, kaj same kiel vi mi ilin malamas, sed tio-ĉi estas nur finbrulonta superaĵo de la malnova malamo kaj de lupsimila malamikeco. Post ĝi venos la novo. Kaj estas nur du vojoj — aŭ por novo, aŭ kontraŭ ĝi.

ŜTUBE — Kaj la tria vojo?

TATJANA — Kia do?

ŜTUBE — Meti la manojn en la poŝojn kaj... observi.

TATJANA — Tiu vojo estas malnobla.

ŜTUBE — Tanjo.

TATJANA — Jes, malnobla vojo. Oni povas iri kun la ventego aŭ kontraŭ ĝi. Sed kiam vi ridetante observas tra la fenestro de nia

domo, kie la nomo de mia patro estas ŝildo de via sendanĝereco? tiam vi perdas mian estimon kaj mian anon.

ŜTUBE—(kun dolora rideto) Kaj al kiu do vi donos tiujn sentojn? Ĉu ne al Artemĉjo Godun, la kriegulo, sencorba stultulo, freneziĝinta pro konscio, ke li antaŭsemajne ekkaptis tiun bastonon, kiun pli frue oni uzis por lin bati.

TATJANA — (retiriĝinte) Hontu. La ŝipanaro ne amas vin, sed eĉ Godun ne parolas pri vi tiel maldelikate.

ŜTUBE — Nur tio ankoraŭ necesus... Gustaokaze pri Godun... Mi petas vin ĉesigi tiujn absurdajn anglolingvajn lecionojn, kiuj same utilas por li kiel la selo por la bovino. Eĉ sen tio jam en la mondumo oni rakontas nenecesajn ĉikanojn.

TATJANA — Mi ne bezonas vartistinojn. Mi mem estas respondeca pri mi. Kaj ĉikanojn de viaj amikoj kaj de iliaj edzinoj mi ignoras.

ŜTUBE — Se vi ne volas esti prudenta, mi mem ĉesigos tiun eksperimenton eduki kvarpiedulon.

TATJANA — Kiel do?

ŜTUBE — Mi ĵetos lin malsupren laŭ la ŝtuparo.

TATJANA — Ha, ha, ha... Vi? Ĵetos Godun?

(En la ĉambron eniras B e r s e n e v, vestita militire, pantalonej, botoj, revolvero sur la rimeno kaj sabro. Li aspektas malsanece kaj lace.  
Tatjana eksilentas kaj kuras al la patro.)

TATJANA — La paĉjo revenis. Certe, vi tre laciĝis. Kiel elturmentita vi estas? Kompatindulo! For tiun ĉi supervestaĵon (disbutonas la rimenon, metas la sabron en la angulon kaj kondukas la patron al la tablo. Ŝtube malafable foriras al la angulo).

B E R S E N E V — (al la filino) Atendu, atendu vi, rapidemulino.

TATJANA — Nu, paĉjo, sen pluaj paroloj. Sidiĝu. La patrino tuj venos kaj alportos la teon. Ŝi jam plorplendis sen vi. Ŝi imagis diversajn terurojn. Ĉu oni ne mortigis la paĉjon?

B E R S E N E V — (returnante la kapon, rimarkas en la angulo Ŝtube) Ha, Leopoldo, saluton, mia kara.

ŜTUBE (sektone) Sanon deziras, Eŭgeno Ivanoviĉ.

B E R S E N E V (atente rigardas Ŝtube, sur liaj lipoj aperas rideto kaj li alparolas sian filinon) Kaj hodiaŭ la patrino koro estis profeta. Efektive mi povis esti mortigita.

TATJANA — Kion viparolis? Kiamaniere do?

B E R S E N E V — (Trankvile) Okazis tia malsaĝeco kaj malnobla historio. La ŝipanoj elmarŝis al la demonstracio sen armiloj, nur la gardistaro havis fusilojn. Ĉiuj marŝis trankvile, organizite kaj dece. Sur la stratoj estis amaso da publiko, la suno brilis, estis gaje. Kaj subite sur la angulo de strato Nevski kaj strato Sadovaja<sup>2</sup> tute neaten-dite — ta, ta, ta, tata... Estis mitraljezo. Komence mi simple ne komprenis. Nur la homoj falis. Unu, alia... Aŭdiĝis krioj... pafado... poste punico... La tuta homamaso kuris disen. Kaj tiam venis sabratako de kozakoj al la forkurantoj.

ŜTUBE — Fine do!

TATJANA — Kaj poste?

BERSENEV — (ekrigardante al Stube) Kaj kio do okazis poste mia karulino! Godun kaj mi apenaŭ sukcesis kolekti la ŝipanojn sur la angulo de la strato Gorohovskaja kaj tiam la ŝipanoj... kaj tiam la ŝipanoj fariĝis veraj rabbestoj. La kozakoj provis ankoraŭ unufojon ataki, sed apenaŭ sukcesis forkure sin savi. Oni preskaŭ mortbatis vunditajn kozakojn. Kun peno Godun detenis la ŝipanojn. (Paŭzo) Estis malbonega afero, mia karulino. Blindigitaj homoj laŭkutime provas solvi malfacilajn situaciojn per plumbpluvo, sed tio jam ne taŭgas. Ili mem fosas al si la tombojn kaj furiozigas la amason. Estos la dua Helsingforsio, sed ankoraŭ pli terura.

STUBE — Nenio estos. Eĉ en la vilaĝo oni scias, ke por la bruto necesas bastono kaj vipo.

BERSENEV — (mallaŭte) La homoj ne estas brutoj, mia kara. La homoj estas homoj.

STUBE — Estas bandaĉo. Ili estas pli malbonaj ol la brutoj. Sencerba amaso.

BERSENEV — Mi timas, ke vi eraras.

STUBE — Mi ne sola tiel pensas. Pri tio parolas la tuta ŝipanaro kaj la tuta oficiraro.

BERSENEV — La oficiraro ne estas la tuta ŝipanaro. Mi estas preta pensi, ke sencerba amaso ĝuste estas tiuj, kiuj, gardante siajn malsagajn akcespraĵojn kaj siajn privilegiojn, hontinde lasis la ŝiparon al blinda sorto.

STUBE — Kiam la ŝipanaro komencis lavi ferdekon per nia sango...

TATJANA — Sufiĉas, Leopoldo. La paĉjo laciĝis kaj ne necesas lin eksciti. Foriru.

STUBE — Mi foriros. Baldaŭ mi tuto foriros. Estas malagrabla manĝi la panon, kiu odoras per perfido. (Rapide foriras).

TATJANA — (pirolas al foriranto) Vi estas sentaŭgulo.

BERSENEV — Lasu lin. Li estas kompatindulo. Venki tradiciojn — estas malfacila afero.

(Tatjana staras apud la fenestro, pugnigante la manojn kaj dentmordante la lipojn. Eniras Berseneva, kunportante samovaron. Bersenev iras renkonte al ŝi, prenas la samovaron kaj ĝin starigas sur la tablon. Poste li kisas la manon de sia edzino).

BERSENEV — Saluton, mia maljunulino.

BERSENEVA — Kiel pala vi estas. Ĉu vi tre laciĝis?

BERSENEV — Jes iometo. Tanjo, ĉu vi trinkos teon kun mi? (Tatjana malrapide iras al la tablo.)

(Oni frapas pordon).

BERSENEVA — Eniru, eniru...

(...Eniras Godun. Li estas vestita ŝipane: botoj, revolvero sur la rime-no, en la mano estas portmapo. Lia kapo estas bandaĝita).

GODUN — Bonan vesperon. Ĉu mi povas?

BERSENEVA — Nu, kompreneble. Vi venis ĝustatempe. Tuj ni trinkos teon. Vi ja ankaŭ estas tre laca kaj malsata.

GODUN — Ostaro doloras, kvazaŭ mi estus dorminta sur la ŝtono  
BERSENEVA — Bonvolu. Sidigu.

GODUN — Dankon. Sed ĉu por komenco ne troviĝas ĉe vi broso por  
brosi la veston, ĝi estas polvoplena. Estas honte altabliĝi... Kaj  
estus bone iom ŝpruci la vizaĝaĉon...

TATJANA — Vizaĝ ĉon?

GODUN — Nu, kontinent-esprime, lavi la vizaĝon...

BERSENEVA — Ha jen kio. Iru, mi vin gvidos al la kuvo-ĉambro.  
Tie estas ankaŭ la brosoj.

GODUN — Jen, dankon por tio.

(Godun kaj Berse ne va foriras).

BERSENEV — Tanjo, donu al mi la pipon.

(Tatjana prenas la pipon, tabakŝtopas ĝin, donas al la patro kaj ekbruligas ĝin).

TATJANA — Paĉjo, ne koleru Leopoldon. Li devojiĝis.

BERSENEV — (post paŭzo) Estas maldolĉe pro vi, Tanjo. Leopoldo  
restas restoracia leŭtenanto, flirtanta maristo de bulvaroj. Oni  
demetis epoletojn, oni deprenis la rangorespekton — kaj ne restis  
plu homo. Desupre estis uniformo, kaj sub la uniformo — putraĵo.  
Ekblovu nur kaj ĉio polviĝos. Estas tre duba, ĉu li resaniĝos.

TATJANA — (malrapide) Se li ne resaniĝos — ni fortranĉos.

BERSENEV — Domaĝe, domaĝe, ne tion mi atendis.

(Revenas Berse ne va kaj Godun. Enirante Godun glatigas  
sian hararon).

GODUN — Bone mi min lavis. La akvo estis kiel glaciaĵo. Mi kvazaŭ  
novenaskita en la mondon elsaltis. Kaj nun mi jam povas saluti  
vin tutkonvene. Saluton, maŝtrineto (premas la manon de Berse-  
neva). Saluton, Tatjana Eŭgenjevna. Kial vi estas tiel malgaja  
hodiaŭ?

TATJANA — Bonan vesperon, Artem Mihajloviĉ. Simple mi sentas  
min malsaneta.

(Rimarkas bandaĝon sur la kapo de Godun).

Kio estas kun via kapo?

GODUN — (ne volonte) Tiel... la kozaketo regalis.

TATJANA — Ĉu li vundis vin?

GODUN — Kiel diri. Li disŝiris la haŭton, apenaŭ la ostoj ne atingis.

TATJANA — Necesas bandaĝi kiel eble plej bone.

GODUN — Dankon. Mi jam estis en apoteko. Oni bandaĝis min tie.  
Estas bagatelo. Mi kondutis hodiaŭ, Tatjana Eŭgenjevna, kiel  
malkuraĝulo. Kaj kia malkuraĝulo! Ha, ĝis nun mi ne povas re-  
konsciiĝi.

TATJANA — Rakontu...

BERSENEVA — (alŝovinte al Godun teglason) Bonvolu teon.

GODUN — Dankon. (Sidigas) Je dio, mi ektimis. Nur imagu. Kiam  
komenciĝis sur la Sadovaja strato tiu-ĉi mitraljeza paradizo, iu de  
la ŝipanaro ekkriis kiel freneza: Fratetoj... savu vin, kiu povas...

Kaj ĉiuj kuris disen, kiel pizoj sur la ferdeko Mi kvazaŭ svenis de konsterniĝo. Senkomprene mi ĵetis min flanken, kaj frapiĝis al io kaj tuj ekrampis sur ĝin, supren. Estis kvazaŭ sur batalmasto. Du minutojn pli poste mi rekonsciiĝis, rigardis kaj vidis, ke mi sidas sur strata lanterno, kiun mi ĉirkaŭprenis kiel sampatran frateton, kaj mi eksplodis per rido. Jen malsaĝulo, mi pensis. Sur la lanterno mi estas de ĉie vidata. Nur pafu — kaj trafu. Nu, mi rapide rampis de la lanterno, falis sur kvarpiedojn kvazaŭ ankro sur fundon kaj, malantaŭen rampante, alboridiĝis al dom-muro. Sidiĝis mi sur teron kaj ekridetis. La publiko streĉas okulaĉojn kaj pensas: certe, freneziĝis tiu ŝipaneto pro la timo (ridegas).

TATJANA — Nu, ja tute ne estis kaŭzo por rido. Estas bone, ke vi foriris sendifekta.

GODUN (malgaje) Jes... kaj du ŝipanoj enĉerkiĝis. Pro nenio... Ili estis bravaj buboj... Sed bone... Venos la tempo—ni pagos kun procentoj aldone... (Trinkas teon) Ha, Eŭgeno Ivanoviĉ, estas, verŝajne, necese, ke ni tuj iru sur la krozŝipon. Tie sendube nun estas bruo kaj malkontento. La ŝipanoj vere sataniĝis pro tiu-ĉi malnoblaĵo.

BERSENEV — Jes. Ni iros. Mi nur alivestiĝos.

BERSENEVA — Ĉu vi denove foriros?

BERSENEV — Jes, mi foriros, mia maljunulino. Estas necese. Donu al mi puran tolaĵon. Mi estas rimarkinde malpura (ambaŭ foriras).

GODUN — Via patrineto ĉiam maltrankviliĝas, Tatjana Eŭgenjevna.

TATJANA — Estas nature. Ĉikanulinoj rakontis al ŝi pri diversaj teruroj. Jen iun oni mortigis, jen tiun — dronigis, tiun — arestis, kaj rezulte ŝi paŝadas tutan tagon kiel timigita kovkokino. (Paŭzo) Gardu la patron, Artem Mihajloviĉ.

GODUN — Ne necesas, ke mi lin gardu. La tuta ŝipanaro lin gardas pli ol torpedan kelon.

TATJANA — Dume li troviĝas kun vi, mi ne timas. Sed sur la ŝtato, kie fremdaj ŝipanoj...

GODUN — Nu, se iu lin tuŝos, ni elŝiros la kapaĉon de tuŝinto kun la radiko, kiel la ankron el grundo, kaj krom tio ni vian patron sen akompanantoj ne lasas. (Paŭzo) Kaj la lastan leciontaskon, kiun vi donis al mi por traduko, Tatjana Eŭgenjevna, mi jam finskribis. Pardonu min, ke mi skribis tiel kurbe, sed mi ne havas tempon, kaj la fingroj ne obeas al mi. (Serĉas en la portmapo, poste elprenas la paperojn kaj donas al Tatjana).

TATJANA — Estas ne grave! Nur estu la leciontasko farita. (Rigardante la paperojn) Nu, ĉio estas en ordo. Sed tie-ĉi, vi eraris. Tiuloke la senco estas ne tute ĝuste interpretita.

GODUN — Ha, diablo ĝin prenu. Nu iam mi venkos la malfacilaĵojn.

TATJANA — Sed jen ĝustatempe mi ekkmemoris. Mi ĉiam forgesis vin demandi, kiacela vi lernas la anglan lingvon?

GODUN — (atenteme) Kaj kial vi demandas?

14 TATJANA — Simple al mi estas interese.

GODUN — (malgaje) Pardonu min, Tatjana Eŭgenjevna, al mi ŝajnis, ke vi demandis min kun rideto. Mi estas tre dankema al vi por viaj penoj, sed pli mi ne volas vin ĝeni.

TATJANA — Ĉu vi estas normala Godun? Kion vi elpensis?

GODUN — Mi ĉiam timis tion. Tio restis de infanaĝo. Jen ĉiufoje mi suspektas kvazaŭ sinjorecan ignoron al griza homaĉo. Kvazaŭ oni diras—kiel do vi povas trafi al la instruituloj? La animon premas fiero. Per dentoj mi estas preta mortmordi.

TATJANA — Artem Mihajloviĉ, rekonsejiĝu. Jen — strangulo. Mi ja demandis serioze.

GODUN — Pardonon mi petas pri stranguleco. Sed se vi volas serioze scii—do mi diros. Laŭ nuna mia rango mi estas kvazaŭ dua komandanto sur la ŝipo kaj, se mi kondukas la ŝipon, — do necesas kompreni la markartojn, kaj markartoj estas ĉiam anglalingvaj. Nia oficiraro, dancante sur la baloj, ne trovis liberan minuton por prepari ruslingvajn. Nun staras mi antaŭ la markarto kiel malsaĝulo, rigardas fremdajn literetojn kaj pensas: grizulo needukita vi estas, grizulo. Kaj kiom da scioj necesas ankoraŭ enigi en mian kapaĉon; mi ja kvazaŭ avangardas la revolucion. Sed fakte ĝi trenas min — senvojan senalfabetulon.

TATJANA — Kiel kuraĝa vi estas kaj kiel ĉarma.

(Paŭzo, Godun ridetante rigardas Tatjanan. Ŝi ĝene forturniĝas al la fenestro)

TATJANA — La sunsubiro estas tiel hela.

GODUN — Hm... (daŭras rigardi Tatjanan).

TATJANA — Kial vi min tiel rigardas?

GODUN — Trafis en mian kapon unu penseto (eksilentas). Jes... lastfoje vi promesis al mi, Tatjana Eŭgenjevna, anglan libreton.

TATJANA — (rapide stariĝas) Ĝuste, kaj mi forgesis. Vi iom sidu, kaj mi tuj ĝin alportos (foriras).

GODUN — (rigardas ŝin forirantan) He... he (iom trinkas la teon, ne rimarkante enirantan Ŝtubon).

(Ŝ t u b e. ekvidinte apud la tablo Godun, haltas kaj klakfermas malfermitan cigaredujon. Godun turnas sin al tiu klaksono)

GODUN — (sidante) Sanon mi deziras al vi, sinjoro leŭtenanto.

(Ŝtubo silente rigardas Godun).

GODUN — Saluton... Kun vi mi parolas. Aŭ ne estas aŭdeble?

ŜTUBE — Oni povas stariĝi, kiam vi parolas kun oficiro.

GODUN — (maldiligente, kun rideto) Kaj pro kio mi devas stariĝi? La piedoj estas do miaj, sed ne regnaj, kaj krome mi estas tie-ĉi ne por militdeĵoro.

ŜTUBE — Stopu vian buŝon.

GODUN — (ridiĝe) Kial vi parolas ĉion tiel mallonge. Stariĝu. Stopu vian buŝon. Mi parolas kun vi bonintence kaj vi grakas.

ŜTUBE — Ne parolu maldece, Artem.

GODUN — Mihajloviĉ. Sed ĉu mi parolas maldece? Mi komprenas. Ni estas, kompreneble, homoj diversspecaj. Komuna inter ni estas

nur tio, ke ni ambaŭ de unu loko eliĝis. Cetere, vin la kuracisto akceptis, kaj min la patrino mem per tranĉileto detranĉis.

ŜTUBE — (ekscitite) Silentu, bruto.

GODUN — (subite minace) Silentu vi. Evidente sub la akvoŭ vi ekdeziris.

ŜTUBE — (sinforgese) Pli frue tien iros vi, sentaŭgulo (elkaptas revolveron).

GODUN — elkaptas revolveron kaj saltleviĝas. Forprenu la manaĉon, hundinido, aliel mi enigis kuglon tien, kien vi ne volas.

(Ekaperas Tatjana kun la libro. Pro surprizo ŝi faligas la libron kaj, sin ĵetas inter la viroj).

TATJANA — Atendu. Malantaŭen. Kio okazas? En nia domo? Leo, for la revolveron. Momente. Godun kaŝu tiun abomenaĵon. Nu, kara (Godun kun rideto kaŝas la revolveron. Ŝtube staras, tremante pro furiozo, kunpremante tenilon de sia revolvero. En la pordo aperas Ksenja. Ŝi estas vestita en tre malfermita helblua silka robo kun bukedo de rozoj en la mano. Ne remarkite, ŝi staras sur la sojlo, rigardante la grupon apud la tablo kaj subite eksplodas per ridego).

KSENJA — Ha... ha... ha... Estas bildo (kantas) «Malamikoj? Ĉu delonge reciproka sangavido apartigis tiujn du.....»

TATJANA — (rapide turniĝas) Ksenja, kiel ahomene estas ekaperi seninvite kaj ne ĝustatempe, kiel diablo el subscenejo.

KSENJA — Ha, mia dio... La diablo... Kio estas do kun vi? Ĉu efektive? Sinjoroj viroj, defendu kompatindan junulinon, kiu amas en la vivo nur amon, vinon kaj versojn.... Leo, ĉu mi similas al diablo?

(Ŝtube silentas. Ksenja aliras lin).

KSENJA — Kio estas al vi? Ĉu vi plenigis la buŝojn per la akvo. Ha...

Kio estas tio-ĉi. Forprenu vian abomenan pafilaĉon. Vi povas vin vundeti. Vi ne povos sidigi sur la kanapon en pozo de Dorian Grey.

(Ŝtube senkonseie formetas la revolveron kaj flankeniras al la antaŭscenejo).

KSENJA — Nu, de vi mi nenion atingos. Ha, la gvidanto de proletaro kaj glora, ruĝa admiralo Godun, diru vi, ĉu mi similas al diablo?

GODUN — (kolerege) Kiaccele... vi estas fraŭlino, tute honorda.

KSENJA — (Riverencas kaj sendas al li aerkison) Brave, brave, karulo.

Vivu ĝentileco en la ruĝa ŝipuro. Jen al vi, pro via kavalireco.

(Ĵetas al Godun la bukedon).

GODUN — (distrite kaptas florojn) Dankon. (Mekanike kaj nerve ŝiras rozajn florfoliojn).

KSENJA — Ha, kia temperamento. Li jam sortodivenas pri mi — ŝi amas, ne amas. Sed kiel vi pensas? Godun, ĉu mi povas vin ekami,

TATJANA — Ksenja ne parolu sensencaĵon.

KSENJA — Ĉu vi ĵaluzas, kamaradino virgulino. Ho ve, virgulino, mi vin komptas. (Turnas la kapon) Mian balancseĝon! (Sin ĵetas sur la balancseĝon). Nu sinjoroj, rakontu al mi ion gajan. Ekzemple, kio okazis tie-ĉi! Ĉu romantika duelo, aŭ politika konflikto?

Rakontu do! (Metas la piedon sur piedon, malkovrante la genuojn).

Ruĝa admiralo, ĉu mi havas belajn genuojn?

GODUN (ne rigardante, severe) Estas belaj.

KSENJA — Ha, ha, ha... kiel severe. Kvazaŭ ĉe hebrea enterigo.

TATJANA — Vi faros plej bone, se vi foriros.

KSENJA — Kial do? Al mi tie-ĉi estas bone. Tie-ĉi estas du viroj.

Leo, vere estas, netaŭga, sed kompanse, Godun — estas la viro tute honorda, laŭ lia propra terminaro.

TATJANA — Tenu la langon.

(Eniras Bersenev kun sia edzino).

BERSENEV — Nu ni ekiru. Mi estas preta.

GODUN — (kun faciligo) Ni iru. Ĝis la revido, Tatjana Eŭgenjevna.

TATJANA — Ĝis la revido. (Levas la libron) Ne forgesu la libron.

GODUN — Efektive, mi preskaŭ forgesis.

KSENJA — Ruĝa admiralo, kaj la adiaŭo kun mi?

GODUN — Ĝis la revido, fraŭlino.

KSENJA — Jen vi meritas punon. Necesas paroli kamaradino, sed ne fraŭlino.

GODUN — Ĝis la revido kamaradino-fraŭlino.

BERSENEV — Do, ĝis la nokto, infanoj (rimarkas flanke starantan Ŝtubę). Leopoldo, kaj vi ankaŭ estas tie-ĉi? Estu afabla, aperu morgaŭ sur la krosŝipo por kontroli torpedan aparataron.

ŜTUBE — Mi ne povas. Mi estas malsana. Okazu la kontrolo sen mi.

BERSENEV — Nu, pardonu, mia kara. Vi estas ne tiom malsana.

Dume mi komandas la krosŝipon kaj ne eksigis vin. Do estu afabla plenumi oficajn ordonojn kaj ne donu malbonan ekzemplon. Se vi estas malsana, prezentu oficialan raporton, kaj ni sendos vin al la medicinkomisiono. Perforte ni vin ne tenos.

(Iras al la pordo, la edzino lin sekvas).

GODUN — (postirante Bersenev-on, turniĝas al Ŝtubę kun malestima rideto) Povas esti, via moŝto, timas la ŝipnetojn. Do ne timu. La ŝipnetoj al vi malbonon ne faros. La malnova pano kun salo ne forgesiĝas. Vi estas ĉe ni bonvenal!

(Godun malaperas en la pordo. Ŝtubę, pugnigante la manojn, sin ĵetas furioze antaŭen, sed haltigita per rigardo de Tatjana piedfrapas kaj forkuras).

(Kurteno falas)

## DUA AKTO.

Ferdeko de la krozŝipo Aŭroro. Estas mateno. Ĉe la maldekstra flanko de scenejo vidiĝas kirasturo de 15 cm. kanono. Super la turo—komanda ponteto. Meze de la scenejo—subirejo en la oficirajn kajutojn. En la malantaŭo de la scenejo vidiĝas supro de aŭra ŝtuparo, kiu servas al boatoj por albordegi al ŝipo. Apud la surirejo staras gardostaranto. La ferdeko estas lavata kaj purigata. Ŝipanoj nudpiede purigas kuprajn ŝipo-partojn. En la antaŭaĵo de la scenejo unu ŝipano peŝas ferdefendojn. Ĉe ŝevigo de la kurteno aŭdiĝas laŭtaj voĉoj. Kvar ŝipanoj tiras ŝnuron kaj metas ĝin en ŝnurejon ĉe la kanonturo.

**LA TIRANTOJ** — Nu ektiru... pli vigle, fratuletoj, ne dormu, tiru-ektiru.

**1-a ŜIPANO** — (peŝanta la fendojn, kantas)

«Tranĉas Dunja harligeton,  
Donas al ŝipan' banteton.  
Dunja, Dunja-karulin'!  
Dunja, mia kolombin'.

(Cinj ŝipanoj kante ripetas la lastajn du versojn. La 1-a ŝipano akre fajfas laŭ la melodio).

**2-a ŜIPANO** — Ci, fajfulo-rabulo. Ci fajfas, kiel la komandanta fajfilo. Kvazaŭ alarmon vi fajfas.

**1-a ŜIPANO** — Kian alarmon?

**2-a ŜIPANO** — Ci do forgesis! Tenas leporo en vosto memoron. Kaj kiam en Petrogrado la mitraljezoj fajfetis — vi la pieŝplandojn per lardo ŝmiri pretis. Se mi ne estus kaptinta cin ĉe pantalonc—ci, certe, kiel Jesuo la Savinto — ĝis Kronŝtadto piedmaniere super la akvo estus kurinta.

**1-a ŜIPANO** — Silentu pli bone, Losev-frateto. Restu vi en via strateto. Se mi peŝos viajn pantalonojn, devos la knabinoj funebri (ridego).

**3-a ŜIPANO** — Nu, Losev, ĉu ne trafe?

**4-a ŜIPANO** — Ne amas koro langon kun pipro. Ha, vivaĉo ni! — naskis cin avino.

**LA GARDOSTARANTO** — Ci ankoraŭ plendas pri la vivo. Sabate vi ja vendis sur bazaro ŝipanan vestaĵon. (Ridego).

**4-a ŜIPANO** — La ŝipana vestaĵo estas ne via zorgaĵo. Ni naĝas kiel perĉoj, amas ŝercojn, trinkas limonadon kaj ĝuas vivadon.

**MALJUNA ŜIPANO** — Fi-fripono, — amas ci langon per la dentoj froti.

**4-a ŜIPANO** — Kaj ci, maljunulo, ne aŭskultu — mortu pli rapide (ridego).

**1-a ŜIPANO** — Portu vi, ŝipan', banteton,

Ne forgesu vi Dunjeton.

Eh — Dunja, Dunja-karulin'.....

(El post kanonturo aperas Ŝvaĉ kaj proksimiĝas al la grupo de laborantaj ŝipanoj).

ŜVAC — Kiajn kantojn vi kantas kamarado. Nura maldecaĵo. Neniom da civitana konscio. Nun necesas kanti nur kantojn revoluciajn, elmontri sian sindonemon al la libero.

4-a ŜIPANO — Kiajn do kantojn?

ŜVAC — (konfuzite) Nu, marseljezon.

4-a ŜIPANO — (kalkulante per fingroj) Marseljezon... kaj pluen?

ŜVAC — Varŝavjankon...

4-a ŜIPANO — (kalkulante la duan fingron) Varŝavjankon... kaj ankoru?

3-a ŜIPANO — (fluŝtrante al Ŝvach) Gardu nin di'...

ŜVAC (aŭtomate) — Gardu nin di'... (ridego).

ŜVAC (koleriĝinte). Tfu... Hundidoj... Nur maldecaĵojn vi kriaĉas.

1-a ŜIPANO (konfuziĝinte) — Mi ja nenion, ni nur tiel...

ŜVAC — Certe nur tiel. Neniom da konscio. Nur iu grizaĵo antaŭregima. Jen kiel.

5-a ŜIPANO — Mem vi estas grizaĵo antaŭregima. Diru, kial, kantante Marseljezon, vi ĉiam melodias ĝin laŭ «Gardu nin di'»....

ŜVAC — Stultulo (turniĝas kaj foriras).

5-a ŜIPANO — Mi aŭdas tion de idioto.

6-a ŜIPANO — Jen interparolo de du koroj.

5-a ŜIPANO — Ne amas mi lin hundidon. Antaŭtempe li ĉiel servis al la oficeiroj, volis fariĝi suboficeiro, kaj nun li tute bolŝevikiĝis.

4-a ŜIPANO — Naturnaskita aĉulo. Patron kaj patrinon li forvendus por sia utilo.

LA GARDOSTARANTO (krias) Venas kutro. Al surirejo.

4-a ŜIPANO — Kiun do trenas la diabloj por la juĝo terura?

LA GARDOSTARANTO — Germana vizaĝaĉo venas.

5-a ŜIPANO — Kia do?

LA GARDOSTARANTO — Sola ĝi estas ĉe ni registrita. La torpeda oficeiro fon-ŝtuba.

5-a ŜIPANO — (Haltigante la deĵorantojn, kiuj intencas malsupreniri la ŝtuparon por renkonti la kutron) Returniĝu. Estos bone eĉ sen tio. Li povos ankaŭ sola elrampi.

1-a ŜIPANO — Kion do li bezonas?

3-a ŜIPANO — La kapo enuas sur la ŝultroj. Li klopodis, ke oni lin liberigu de la servo kvazaŭ pro malsano.

1-a ŜIPANO — Ĝisatendos li donaceton. Sen iu komento oni sendos lin al batalfronto.

MALJUNA ŜIPANO — Jen kalamburistoj — prenu vian patrinon diablo! Ĉiu parolo taŭgas por sia rolo.

4-a ŜIPANO — Mi havas sub hepato tian platon. Jen de tie ĉio venas (ĉe la alboriĝa ŝtuparo aŭ iĝas bruo de alveninta kutro. Sur la ferdeko aperas ŝipanoj, ĉesinte labori, kun ironia silento rigardas lin, ĝis kiam li mallevinte la kapon maldekstren).

1-a ŜIPANO — (postfajfinte Ŝtuba-n) Fi ĉi, nu ĉi—jen elegantul'!

2-a ŜIPANO — Vera pavo sinama.

**MALJUNA ŜIPANO** — Kaj, kie nur homo povas trovi tiom da kolero? Li preterpasas kaj eĉ ne rigardas, kvazaŭ naŭzas al li rigardi la ŝipanojn. Kaj en la okuloj — verda fajro. Li formanĝus nin eĉ sen sinapo — se nur estus lia povo.

**3-a ŜIPANO** — La dio refutos kaj Ŝtube nin ne glutos.

**4-a ŜIPANO** — Lia stomako nin ne digestos... Nu, Bazil', venis fino al labor'.

(Kunmetas la ĉifonojn, per kiuj li purigis la kuprajn ŝippartojn. De maldekstre venas boatisto Jeremejev).

**JEREMEJEV** — Nu, plivigle, diabloj submaraj, — prenu vian patriron bonmaniere. Necesas, ke je la naŭa la kroŝipo aspektu kiel ludilo. Ŝnurvipoj mankas por vi, hundidoj. Vi ĝuas nur la liberon — krevu ĝi kune kun vi.

**3-a ŜIPANO** — Kion do ci kriaĉas, Jeremejev. Aŭ la edzino ne donis al ci vinon (ridego).

**4-a ŜIPANO** — Kriaĉas li, buŝego malfermita — sed nenio atingita.

**JEREMEJEV** — Babilu al mi, nur babilu. Mi ne estas oficiro. Mi ne povos cin konvinki, sed simple argumentas en la dentaron...

**4-a ŜIPANO** — Estus bone, se ci, Jeremeĉ, irus for en tia humor' Ni povas ja ŝtopi buŝaĉon, per kio do tiam vi parolaĉos... (ridego).

**JEREMEJEV** — Trafu vin fulmotondro, trioble malbenitaj, krevu vi ĉiuj (kraĉas kaj foriras).

**3-a ŜIPANO** — Nu, kun tiu ni finis.

**2-a ŜIPANO** — Eble Jeremeĉ nun pretas krevi (post la scenejo aŭdiĝas voĉoj: «Sanon deziras, sinjor' kapitano!»).

**5-a ŜIPANO** — Silentu, bubaro. Venas Eŭgeno Ivanoviĉ.

(Eldekstre eliras Bersenev kaj Ŝtube)

**BERSENEV** — Bonan matenon, bubaro!

**ŜIPANOJ** — Sanon deziras, sinjor' kapitano.

(Bersenev sidigas sur la subirejon de la kajuto. Ŝtube staras antaŭ li).

**BERSENEV** — Pri kio do temas, mia kara?

**ŜTUBE** — Mi insistas, Eŭgeno Ivanoviĉ, ke vi liberigu min de la servado. En tiuj kondiĉoj mi ne povas servi. Tio ne konformas al mia kompreno de oficira honoro. Mi prezentis oficialan raporton pri la malsano, kiel vi proponis al mi psintsemajne.

**BERSENEV** — Mi skribis rezolucion, ke «mi konsentas», kaj trasdonis la raporton al la komitato.

**ŜTUBE** — Vi povus mem forliberigi min, kaj ne miksi en tiun aferon la komitat'nan bandon.

**3-a ŜIPANO** — Ĉu vi aŭ'is?

**5-a ŜIPANO** — Lasu lin babili. La hundo bojas, la vento forportas.

**BERSENEV** — Ĉar mi konsentis labori kun la komitato, mi nenion faras sen ĝia vizo.

**ŜTUBE** — Eŭgeno Ivanoviĉ. Finfine tio estas riĉinde. Iu tute nebezona puritanismo kaj kun kiu? Al tiuj ĉi sentaŭguloj plaĉas mokturmenti la oficirojn kaj montri al ili sian potencon.

La komitato intence prokrastigos tiun decidon, sciante, ke ĉiu tago sur la ŝipo estas por mi tortura.

BERSENEV — Kiel vi volas. Mi petos plirapidigi la decidon. Mi retenas vin pro viaj propraj intereso.

STUBE — Ĉu pro miaj?

BERSENEV — Mi volas konservi por vi vian edzinon.

STUBE — (kolereme) Mi petas, ne parolu pri tio. (Malafable turniĝas, foriras kaj apud la kanon-turo renkontiĝas kun Ŝvaĉ).

ŜVAĈ — Via moŝto, via moŝto...

STUBE — (haltas kaj rapide ĉirkaŭrigardas) Nu, parolu... kaj ci ne uzu tiun «moŝtecon». Oni povas aŭdi.

ŜVAĈ — Mi obeas, via... sinjoro leŭtenanto. Do kun la konduktoro mi havis interparolon.

STUBE — Kaj kio do?

ŜVAĈ — La konduktoroj, certe, komprenas kaj tiel ili ĝenerale konsentas, sed nur ili mem nenion komencos. Ni, ili diris, restos neŭtralaj, sed necesas nur, ke la sinjoroj oficiroj sukcesu, kaj ni sam-momente aliĝos. <sup>5</sup>

STUBE — Ha, malkuraĝa bandaĉo.

ŜVAĈ — Ĝuste tiel, sinjoro leŭtenanto, sed se bone pripensi, tiam ilia situo ankaŭ estas nebrila. Ili estas nek ŝipanoj, nek oficiroj, kaj ambaŭ flankoj ilin premas — turniĝu, kiel vi volas. Por iuj estas akirita la libereco, sed por boatistoj kaj por konduktoroj venis neniaj rajtoj.

STUBE — Pri kiuj rajtoj vi ekparolis? Ĉu vi ankaŭ infektiĝis per bolŝevismo? Gardu vin, tenu la langon.

ŜVAĈ — Pardonu, sinjoro leŭtenanto. Neniel mi tion pensis. Mi bone komprenas mian servon kaj mian servo-lokon.

STUBE — Nu, sufiĉas... iru, oni povas rimarki nian interparolon. Se estos io nova, precipe, se alvenos sur la krozŝipon bolŝevikoj el la urbo, venu tuj en loĝejon.

ŜVAĈ — Bone, sinjoro leŭtenanto.

(Stube foriras. Bersenev, sidinta kaj de flanke observinta la interparolon de Ŝvaĉ kaj Stube, vokas Ŝvaĉon).

BERSENEV — Boatisto.

ŜVAĈ — Leŭ ordono, sinjoro kapitano.

BERSENEV — Kion vi faras ĉi tie? Kial vi ne estas sur la turo? Kial vi ne kontrolas la purigadon?

ŜVAĈ — Pardonu, sinjoro kapitano. Mi nur preterpasis.

BERSENEV — Iru al via loko.

(Ŝvaĉ foriras. Ridego inter la ŝipanoj).

3-a ŜIPANO — (duonvoĉe) Estas brogita la felo de hundido.

BERSENEV — Plirapidigu, bubaro, plirapidigu.

5-a ŜIPANO — Ni penas, sinjoro kapitano. Tuj ni finos. (El la subferdeka loko aperas Godun).

GODUN — Eŭgeno Ivanoviĉ. Vi estas ĉi tie kaj mi vin serĉas mal-supre. Estas jam la deka horo. Necesas baldaŭ akcepti la gastojn.

BERSENEV — Jes. Arangu tie ĉi la purigadon, Artem Mihajloviĉ, kaj mi iros kontroli la ŝipajn dormejojn. Ni montros krozŝipon en bonordo kaj en brilo, malgraŭ ĉiuj onidiroj pri la flosanta malpu-rejo kaj frenezulejo.

GODUN — (riĉante) Jes, ni prezentos surprizeton al la gastoj. Eble, ili eĉ alvenos al ni en galoŝoj kaj kun la pluvombreloj. Ili pensas, ke ni dronas en sunflorsemoj kaj kotaĵo, sed ni viŝos al ili la nazon. (Bersenev foriras malsupren).

GODUN — Ha, nu bubaro, ĉesigu la laboron. Kunvenu en la rondeton kaj ni iom parolos (unu parto de ŝipanoj forportas ĉifonojn kaj bro-sojn.)

5-a ŜIPANO — Tio ĝustas, Artem. Mi mem volis paroli kun vi.

GODUN — Jen, do ni parolu.

(Revenas foririntaj ŝipanoj).

GODUN — La unua afero: necesas pripensi, kiel ni devas akcepti la gastojn. La gastoj ne estas simplaj.

4-a ŜIPANO — Certe. Estas de tiu speco gastoj, kiuj premas la ŝipanojn ĝis ostoj.

GODUN — Ĝuste, bubo. Sed minacas al ni tondro ne el nuĥo, sed el subo. Oni venos por nin palpesplori, kial ni estas tiel malglataj kaj pikemaj, por trovi ĉe ni iun mol-ĵon bone pinĉeblan. Ekhavis la burĝoj intereson por ni. Ne sufiĉas por ili jam faritaj arestoj; ĉu ne sufiĉas jam, ke putras en la malliberejo niaj plej bonaj gvidantoj? Ĉu ne sufiĉas ke mordas la cimo ŝipanon en la arestejo? Oni intencas ŝtopi la ŝiparon en botelon, por ke neniam plu minacu ia ribelo. Scias kateto — manĝis ĝi el kia poteto. Scias kanario Kerenski, ke ne longe li pepos, se la ŝiparo ekzistos. Ili kriiĉas al ni, ke ni de militfronto forkondukis la ŝipon, ke ni ne volas batali por la Dardaneloj, sed ili mem volas fari ankoraŭ pli malbone. Ili volas tute senarmigi la ŝipojn, kaj la ŝipanojn forpeli en marŝbatalionon al la batalfronto.

1-a ŜIPANO — Ĉu nin senarmigi? Ho... ho... ho...

3-a ŜIPANO — Mankos la fortoj.

4-a ŜIPANO — Estis projekto, sed venis difekto.

GODUN — Ĝuste... ĝuste, bubaro. Ili malfermas por germano vojojn al Peterburgo. Se io okazos, ili povos voki germanajn generalojn por helpo. Burĝo, por fari malbonon al ni, pretas paciĝi eĉ kun diablo kaj marŝi kun li man' ĉemane.

MALJUNA ŜIPANO — Ĝuste, Artem.

5-a ŜIPANO — Paciĝi kun ĉiuj diabloj.

GODUN — Jen do, bubaro, oni volas nin formanĝi. Nur ni pensas, ke ne ekzistas ankoraŭ tia forto, kiu povus la ŝipanon formanĝi. Ni jam delonge estas instruitaj. La krozŝipo «Potemkin» komencis tiun aferon, kaj ni ĝin finos. Tenu en la memoro, ke la ŝiparo estas

ne en Finna golfo, sed en Peterburgo. Oni povas perdi la paciencon. Kanono silentas, silentas, kaj poste komencos mem pafi. Nur havu tiam la tempon por aranĝi la alcelon. Mi antaŭsciigis vin, por ke, kiam la bolŝevika komitato donos signalon, tiam iru en atakon, obeu ĝin, kiel admiralon dum la batalo. Memoru, ke la rifuzo ne devos esti.

3-a ŜIPANO — La rifuzo ne estos.

2-a ŜIPANO — Diru tie en soveto. Artem, ke ni ĉiuj kuŝiĝos per ostoj, sed returnen ne iros.

5-a ŜIPANO — Ni ne dorsiros kankre.

GODUN — Bone, kaj nun necesas la gastojn akcepti, tiel, ke ili de-kutimiĝu veturi al ni. Sed aŭskultu, hubaro, ĉio estu sen ia man-batalo kaj iuj ekscesaj agoj.

5-a ŜIPANO — Ne timu, Artem, ni ilin ne tuŝos. La manon malpu-rigi ne penindas.

GODUN — Alvoku, hubaro, la deĵorestro.

(Du ŝipanoj kuras sur la ponteton).

3-a ŜIPANO — Kaj kin alveturos, Artem, ĉu vi scias?

GODUN — Admiralo Milicin kaj kun li iu social-revoluciano — admo-nanto kaj ankoraŭ iu.

(de la komanda ponteto malsupreniras la deĵorestro)

DEĴORESTRO — Laŭ ordono.

GODUN — Kamarado deĵorestro, kiam la kutro kun la komisiono alve-turos, la deĵorgardon ne alvoku, kun raportro ne aliru, kaj supren la ŝipanaron ne fajfu. Nenia ceremonio estas necesa. Tiu ordono estas interkonsentita kun la komandanto.

DEĴORESTRO — Laŭ ordono.

(foriras)

GODUN — Nu, dume mi iros (malsupreniras en kajuton).

5-a ŜIPANO — Nu, estos bruo, hubaro.

4-a ŜIPANO — Ricevos onklino kaĉeton, varmigis sian stomaketon, tenos longe en memoreto.

GARDESTRO — La kutro albordiĝas.

5-a ŜIPANO — Prepariĝu, hubaro.

4-a ŜIPANO — Ĉu renkonti ilin anstataŭ parada marŝo per iu kantaĉo?

2-a ŜIPANO — Ekagu, hubaro, komencu!

(Ŝipanoj intence disiras, maldiligente streĉas sin sur la ferdekon kaj ekkantas ĥore. Sur la ŝtuparon kuras la deĵorantaj ŝipanoj. Dum la kantado sur la ferdeko aperas alveturinta admiralo, homo vestita kitelen kun maldekstra mano, metita inter la kitel-butonoj ĉe la brusto en pozo de Napoleono, kaj ŝipano de la Nigra nara ŝiparo, malaltkreska kaj malfortika hometo, evidente mallerte sin sentanta en marista ve-staĵo. Ŝipanoj finis la kantadon kaj intence malrapide leviĝas).

3-a ŜIPANO — Patro amata, la estraro alvenis!

5-a ŜIPANO — Jen ne atendite, tute senpensite.

MILICIN — (al la unua renkontita ŝipano) Kio fariĝas ĉi tie? Ĉu tio estas bazaro aŭ opereto? Kia kriado! Kie estas la komandanto?

ŜIPANO — Mi ne povas scii.

MILICIN — Kiel ĉi ne povas scii? Ĉu ĉi freneziĝis?

ŜIPANO — Tute ne, via ekscelenco. Mi tute ne estas freneza.

MILICIN — Silentu. Voku la komandanton! (Iu el ŝipanoj rapidas en kajuton).

MILICIN — (al la homo kitelen-vestita) Mi diris al vi.

HOMO KITELEN - VESTITA — Tio estas neaŭdita maldeĝaĵo. (Ĝirkaŭrigardas) Sed ĝenerale tie ĉi estas pure, kaj al ni oni diris...

(El subferdeka loko aperas Bersenev kaj Godun)

BERSENEV — (alirante al admiralino kun la mano apud ĉapŝirmilo) Mi havas la honoron prezenti min, via ekscelenco.

MILICIN — (ne respondante al la saluto) Kie vi estis? Kial sur la ferdeko estas tia bazaro? Kial ne estis vokita la gardodeĵoranto? Kie estas la oficiala raporto? Kiel vi staras, sinjoro kapitano? Tio estas honto, malhonoro. Juĝesploron mi aranĝos.

GODUN — Sinjoro kapitano subiĝas al ordono de la ŝipana komitato, kaj la komitato decidis, ke, ĉar la ŝipnaro estas laca, oni neniam okazu faru iun ceremonion.

MILICIN — Kaj kiu vi estas?

GODUN — Mi estas prezidanto de la ŝipana komitato.

MILICIN — Mi ne scias similan gradon. Sur la ŝipo ekzistas nur komandanto. Voku la ŝiparon.

BERSENEV — Ĉiuj supren.

VOĈO DE DEĴORESTRO — Laŭ ordono. Ĉiuj supren. Trumpetisto trumpetu ŝipnar-kunvenon. La ŝipanoj ordiĝu en vicoj.

(Aŭdiĝas triloj de la ŝipanfajfiloj. La scenejo pleniĝas de kurantaj ŝipanoj. Ili vicordiĝas vizaĝen al la publiko, en kvar vicoj. Dekstre dorsen al la rigardantoj staras: Bersenev, Deĵorestro, Godun, du oficiroj kaj Ŝtubĉefo. Plej dekstre — boatistoj Jeremiejev kaj Ŝvaĉ).

MILICIN — Silenton! Aŭskultu min!

GODUN (de sia loko) Staru libere.

MILICIN — (turniĝinte, kolerege) Kiu tie ĉi komandas?

GODUN — Ni komandas.

MILICIN — Silentu!

(Minaca murmuro kaj movo en vicoj de ŝipanoj. Homo, vestita kitelen, prenas admiralon sub la brako kaj diras ion al li).

MILICIN — (duonvoĉe) Kiel vi volas. Vi mem kulpas pri ĉio kaj vi mem ĉion bonaranĝu kun tiu proletaro. (Laŭte) Staru libere. Tuj kun vi parolos membro de la centra komitato de la partio de socialisto-revolucianoj — kamarado Uspenski.

(Uspenski saltas sur la ŝtupareton. La ŝipanoj, lasinte la vicojn, ĉirkaŭas lin).

5-a ŜIPANO — Ni aŭskultos.

4-a ŜIPANO — Babilu, Teodoro, dume daŭras via horo.

(Ŝvaĉ aliras de malantaŭe al Ŝtubĉefo kaj haltas).

USPENSKI — Ŝipanoj de la revolucia Rusujo! En la nomo ĉe la registaro mi postulas, ke vi aŭskultu mian vorton. Vi troviĝas sur mal-

ĝusta vojo. Demagogiaj promesoj de senrespondecaj elementoj kaj de homoj, sindonintaj al la germana ĉefstabo kaj alveturintaj Rusujon en plumbitaj vagonoj per la germana mono, puŝis vin en la abismon. Vi subfosas la heroecan batalon de via patrujo kaj de ĝiaj kunfederitoj por ĉiuhomaj idealoj.

5-a ŜIPANO — Ĉu baldaŭ vi finos la militon?

MILICIN — Ne malhelpu.

USPENSKI — Vi demandas, kiam finiĝos la milito. Sed la milito ne povas finiĝi sen venko, alie Rusujo estos premita per la Hohencolerna boto.

4-a ŜIPANO — Per kies boto? Parolu ruse. Ne rebuligu la kapojn.

USPENSKI. — De germana boto. Vi devas atenti voĉon de prudento kaj patriotismo.

1-a ŜIPANO — Revenigu niajn arestitajn gvidantojn.

USPENSKI — Mi ne povos paroli, kiam vi interrompas min je ĉiu vorto. Mi postulas, ke vi estimu en mia persono la registaron de revolucia Rusujo. Viaj gvidantoj ricevos merititan punon por ribelo dum milita tempo.

6-a ŜIPANO — Nu, tiam ni mem liberigos ilin.

4-a ŜIPANO — Ni leberigos la birdetojn eĉ kontraŭ via volo.

USPENSKI — Ŝipanoj, rekonsciiĝu. Oni vin trompas. Oni vin puŝas sur vojon de reakcio, de terura reakcio, kiu per torento de frata sango superakvos la landon. La sango jam verŝiĝis antaŭ unu semajno sur la strato Nevski en Peterburgo dum via freneza demonstracio, kiam vi estis perfiditaj kaj forlasitaj de viaj bolŝevikaj gvidantoj.

(Nova murmuro de homamaso, krioj kaj fajfado).

3-a ŜIPANO — Ne tuŝu bolŝevikojn.

2-a ŜIPANO — Iru for.

USPENSKI — Vi blindiĝis, ŝipanoj. Vi ne konscias kaj ne vidas perfidon de germanaj spioroj, ĉar vi estas konfidemaj kaj mallaleraĵ.

5-a ŜIPANO — Mi ne kredas al ĉi.

USPENSKI — Se vi ne volas aŭskulti konvinkojn, ni devigos vin obei al la popola volo per kuglo kaj sango. Ni dekretos mortan ekzekuton por savi Rusujon.

(Forta movo, voĉoj de homamaso kuniĝas en seninterrompa blekego. Admiralo Milicin reiras malantaŭ Uspenski, Uspenski kun timo postrigardas).

GODUN — Pli mallaŭte... pli mallaŭte...

(La bruo trankviliĝas).

USPENSKI — (al Godun) Mi postulas...

GODUN — Se vi volas resti seninfekta, nenion postulu... Pro minaco farita al la ŝipanaro mi forprenas de vi parolrajton.

USPENSKI — Vi ne havas rajton.

GODUN — Mi havas. Ĝi troviĝas en mia pafilo.

USPENSKI — Vi estas perfortuloj. Vi estas perfiduloj.

(Nova eksplodo de krioj «for... iru...» Ŝipano de Nigra-mara ŝiparo diras al Uspenski. Uspenski malsupreniras de ŝtupareto kaj la nigra-mara ŝipano saltleviĝas sur ĝin).

USPENSKI — Se vi ne volas aŭskulti min — do aŭskultu vian kamara-  
don, ŝipanon de Nigra Maro.

5-a ŜIPANO — De kie li eliĝis?

6-a ŜIPANO — Kiu vi estas? De kia ŝipo?

4-a ŜIPANO — Bubo, en kia akvo vi naĝis, kiu vin sanktoleis?

NIGRAMARA ŜIPANO — Bubaro, ŝipanoj. Mi estas ŝipano de Nigra-  
mara ŝiparb, Petro Ĥvatkin. Mi estas de submara brigado.

1-a ŜIPANO — De kia boateto vi estas?

4-a ŜIPANO — Li estas de boateto, duonjaron naĝinta, ĉu jarojn dro-  
ninta.

NIGRAMARA ŜIPANO — Bubaro, ŝipanoj, aŭskultu vian kamara-  
don. Ne kredu al germanaj spiono. Pelu ilin for. Ni ŝipanoj  
de nigramara ŝiparo jam forpulis ilin kaj nun ni kun honoro batalas  
kontraŭ niaj malamikoj-germano. Ĝis plena...

3-a ŜIPANO — (sa. te leviĝas antaŭen). Atendu... haltu... Bubaro,  
ĉu vi scias kiu li estas. Mi unumove ne rekonis lin, vestitan milit-  
forme. Li estas mia samurbano... Lia patro estas butikisto en nia urbo.  
Oni lin forpulis el kvara klaso de real-lernejo... Kanajlo burĝa li estas.

(Ree komenciĝas blekego. La ŝipanoj alpaŝas diversflanke).

VOĈO — Ili nin nomis spionoj kaj ili mem kunveturigis provokistojn.

VOĈO — For!

VOĈO — Batu ilin!

(Pugnoj leviĝas. Seninterrompa blekego).

GODUN — Malantaŭen, hubaro. Ne tuŝu ilin... Vi promesis...

(Bersenev kaj oficiroj sin ĵetas en homamason kaj forigas la ŝipanojn  
de Milicin, Uspenski kaj Ĥvatkin. Ŝtuba staras pugnigante la manon  
kaj tenante dekstran manon en la poŝo, liaj okuloj brilas. La bruo iom  
post iom trankviliĝas.)

ŜVAC — (klinante de malantaŭe al Ŝtuba) Via moŝto? mi ĉiujn krii-  
lojn rekonis laŭ iliaj voĉoj. Ĉu vi postulos ilin noti?

ŜTUBE — Notu, poste...

ŜVAC — Laŭ ordono...

BERSENEV — Kamaradoj, ĝis nuna tempo vi kredis al mi kaj kredu  
do nun ankaŭ. Nenia perforto estas necesa.

GODUN — Disiru, bubaro... senbrue. Sinjoroj delegitoj de la provi-  
zora registaro, mi proponas al vi forlasi la krosŝipon por eviti sang-  
verŝon. Tie ĉi vi estas nebezona. Ni sen vi ĉion bonarangos.

MILICIN — (kolere senkonscie) Mi punos vin... Kiel vi kuraĝas ri-  
beli? Vi estas perfiduloj. Sinjoro kapitano, mi ordonas al vi sub via  
respondeco aresti la komitaton kaj ĉiujn iniciatorojn.

BERSENEV — Provu mem, via ekscelenco. Estas minutoj, kiam nece-  
sas ne esti blinda.

MILICIN — Ĉu vi kontraŭparolas? Tio estas malhonoro. Vi solida-  
riĝas kun ili. Vi respondos antaŭ la tribunalo. Mi deklaras vin —  
arestita.

BERSENEV — Laŭ ordono.

(Nova eksplodo de ribelo inter la ŝipanoj).

VOĈOJ — Sub la akvon ilin, hundidojn!

Trans la ŝiprandon!

Forpelu ilin!

3-a ŜIPANO — Bubaro, ne malpurigu la ŝtuparon per tiu anfibioj. Rulu ilin trans la ŝiprandon... kiel brutaron. (Ridego, krioj... Ŝipano provas kapti la delegacion).

BERSENEV — (Saltas antaŭ la ŝipanojn) Kamaradoj... ne faru tion... mi petas vin...

2-a ŜIPANO — Foriru, Eŭgeno Ivanoviĉ. Via afero estas flanko. Ni amas vin, sed ne malhelpu al ni ekstermi ilin.

(Kelkaj ŝipanoj forigas Bersenev. En tiu tempo Ŝtube saltas antaŭen kun revolvero en la mano).

ŜTUBE — Malantaŭen, diabloj! Bestaro! Mi pafos...

3-a ŜIPANO — Kion vi faras, kanajlo? (Kaptas Ŝtube ĉe la mano. Ŝipano elŝiras revolveron kaj ĉiflifektas Ŝtube-n).

VOĈO — Batu lin, bubaro, ĝis morto.

GODUN — (sinĵetas en homamason) Trankvilon! Lasu lin, bubaro. (Diŝetas ŝipanojn kaj kovras Ŝtube-n) Trankvilon!

4-a ŜIPANO — Jen estas kriulo pli bona ol la admiralo (la bruo mallaŭtiĝas. Silento).

GODUN — Neniu ilin tuŝu. Lasu ilin iri. Ni ne estas rabistoj. Estu glata por vi la vojo, via ekscelenco.

MILICIN — Mi ordonas en la nomo de la provizora registaro...

GODUN — Komuniku al via provizora registaro, ke ni kraĉas sur ĝin. Nia krozŝipo subiĝas nur al la ordono de bolŝevikoj.

MILICIN — (reirante) Vi estas abomenulo ... Ni dronigos vian bandon per kanono.

GODUN — Komandanton ĉi ne trovos, maljuna rato, kaj mem ĉi ne dronigos.

MILICIN — (malsupreniras la ŝtuparon) Vi estas abomenuloj... perfiduloj...

5-a ŜIPANO — Ne ellasu tiom da sonoj, difektiĝos la pantalonoj.

(Sub krioj kaj rido de ŝipanoj Ŝtube, Milicin, Uspenski kaj Ĥvatkin malsupreniras la ŝtuparon. Aŭdiĝas bruo de forveturanta kutro. La ŝipanoj svingas per ĉapeloj al la foriranta kutro).

GODUN — Disiru, bubaro. Sur la ferdeko ne vagu. Ĉiu devas esti sur sia loko. En okazo de io, alarmu. Povas esti, ke la maljunulo freneziĝos kaj komencos nin bombardi de fortikaĵoj.

(Ŝipanoj disiras. La ferdeko malpleniĝas. Apud subferdeka loko restas nur Bersenev, klininta la kapon, kaj du oficiroj. Godun aliras al Bersenev).

GODUN — Ĉu vi malgajiĝis, Eŭgeno Ivanoviĉ? (Bersenev silentas).

GODUN — Ne tre delikate ĉio okazis, sed vi mem vidis, kiu kulpis.

BERSENEV — Por mi estas malfacile tion elporti.

GODUN — Kion do fari. Interbatiĝo do estu interbatiĝo, kaj se la afero tiel progresos, baldaŭ ni ĉeestos veran batalon. Se tio estas super via forto — do diru simple. Ni komprenas, ke estas mal-

facile iri kontraŭ siŭlo, — do diru simple. Eble, estos plej bone por vi — foriri de ni.

(Bersenev silentas. Lia vizaĝo spasmiĝas).

GODUN — Diru simple. Plej bone estas diri dume eblas. Poste iri returnen jam estos malfrue.

BERSENEV — (kun peno) Por mi jam estas malfrue returnen iri. (Firme) Mi ne lasos la krozŝipon ĝis la fino.

GODUN — Bone. Dankon mi ne diras. Dankon diros aliaj. Mi firme fidas al vi, Eŭĝen Ivanoviĉ. Donu vian manon. (Etendas la manon. Bersenev donas la sian).

GODUN — (al la oficiroj) Kaj vi, sinjoroj oficiroj?

OFICIROJ — Ni restos kun la sinjoro kapitano.

GODUN — Vi estas bravuloj, viaj moŝtoj. Kiu estas juna — tiu estas kuraĝa. Do ni iru la saman vojon!

(K u r t e n o)

### TRIA AKTO

La dekoracio estas tiu de la unua akto. Estas la naŭa horo vespere. En momento de levado de la kurteno el la antaŭĉambro aŭdiĝas sonorilbruo. La ĉambristino kuras tra la scenejo. Sur la scenejon eliras *Berseneva* kaj aŭskultas.

VOĈO de ĈAMBRISTINO — Jes, li estas hejme. Kion al li diri?

VOĈO — Diru, ke venis kolonelo Jarcev... Leopoldo Teodoroviĉ scias... Li atendas nin.

ĈAMBRISTINO — (elirante al Berseneva) Ili alvenis al la juna sinjoro, Sofja Petrovna. Du oficiroj.

BERSENEVA — Glaŝa, kial vi restigis ilin en la antaŭĉambro. Invitu ilin tien ĉi. Mi tuj vokos Leon.

(La ĉambristino kuras el la antaŭĉambro. Aŭdiĝas ŝia voĉo: «Bonvolu, eniru en la ĉambron!»)

BERSENEVA — (duonmalferminte la pordon, diras al Ŝtubo) — Leo, al vi venis gastoj.

(En la manĝoĉambron eniras akompanataj de ĉambristino Jarcev kaj Polevoj. Jarcev klinsalutas Bersenevan kaj Polevoj aliras al ŝi kaj kisas ŝian manon)

POLEVOJ — Mian saluton, Sofja Petrovna, kiel vi fartas? Ĉu vi estas sana? Permesu prezenti al vi Aleksej Aleksejeviĉ Jarcev-on.

BERSENEVA — Mi estas tre ĝoja. Mi petas — sidigu, sinjoroj. Leopoldo Teodoroviĉ tuj alvenos, kaj, mi petas pardonon, mi vin forlasos. Mi devas konfiti vakcinion.

POLEVOJ — Ho la vakcino! Tiu ĉi afero estas de neordinara graveco.

JARCEV — Bongusta konfitaĵo estas pli bona ol malbona revolucio. (Ridas. Berseneva kaj ĉambristino foriras).

JARCEV — (komplezige) Ĉu vi volas cigaredon, leŭtenanto?

POLEVOJ — Dankon, sinjoro kolonelo.

JARCEV — Kaj kie estas tiu ĉi belega feino, pri kiu vi tiom babilis dum la vojo? Mi ne pensas, ke tiu ĉi respektinda sinjorino, kun kiu vi min konatigis, povus...

POLEVOJ — Kion vi diras, sinjoro kolonelo! Ĉu efektive vi pensas ke mi amindumas kun maljunulino? Mia objekto estas ŝia malpli aĝa filino, Ksenja Eŭgenjevna. Ŝi estas rava knabineto kaj sen iaj antaŭjuĝoj, plene emancipita kaj vera duonvirgulino.

JARCEV — Mi benas vin, leŭtenanto.

(Rapide eniras Ŝtube, butonumante la kitelon).

STABE — Mi devigis vin atendi. Estu grandanimaj. Mi tre laciĝis kaj ekdormetis iomete.

JARCEV — Bonvolu, kiel tia etiketo? Estu ni sen ceremonioj.

ŜTUBE — Saluton, Polevoj. Kiel vi alveturis? Mi estas tre ĝoja, sinjoroj, vin vidi.

JARCEV — Ni alveturis ne tre bonŝance. Eĉ la mantelojn ni vestis plej kamaradecajn, sen butonoj eĉ, kaj ni ricevis la dokumentojn tute fideblajn; sed tamen dum la vojo, sur la vaporsipeto, la ŝipanaro kvinfoje kontrolis niajn dokumentojn kaj demandis nin kial, kiacele, kien? Kaj sur la kajo iu homo oratoris, ke de nunteno mem en la urbo estas serĉataj burĝaj defendantoj-oficeiroj. Dankon al kamaradoj, ili disbatis ĉiujn lanternojn kaj sur la stratoj estas egipta mallumo.

ŜTUBE — Tio ĉi estas ĉe ni ordinara afero, sinjoro kolonelo. La vivo en Kronŝtadto similas al danco sur la pinto de la tranĉilo.

JARCEV — Sed ĉu tie ĉi, ĉe vi estas sendanĝere?

ŜTUBE — Jes, absolute.

POLEVOJ — Ne maltrankviligu, sinjoro kolonelo. La ombro de kapitano Bersenev, kiel bona genio, alte flugas super tiu ĉi demo kaj forpelas la ŝipanojn.

ŜTUBE — Jes. Kvankam tio estas sufiĉe abomena, sed mi devas diri, ke revolucie altekonscia reputacio de mia bopatro igas mian loĝejon ekster suspekto kaj sendanĝerigas ĝin de ĉiuj eksceso.

JARCEV — Bonege. Pli bonan ne necesas eĉ deziri. Tiam ni komencu rekte pritrakti la aferon, la prokrasto similus al morto. Interalie... Ĉu tie ĉi ni povas paroli pri ĉio?

ŜTUBE — Absolute. En tiu momento hejme estas neniu, krom bopatrino kaj la ĉambristino, kaj ili ambaŭ...

POLEVOJ — Konfitas vakeinon... ha, ha, ha...

JARCEV — (Elprenas el poŝo dokumentojn kaj metas ilin sur la tablon) Ni komencu.

ŜTUBE — Unu momenton, sinjoro kolonelo.

JARCEV — Kion do?

ŜTUBE — Mi atendas nian boatiston Ŝvaĉon. Li estas aktiva kunlaboranto de nia organizacio kaj li informas nin pri ĉiuj agoj de la ŝipana komitato kaj de la bolŝevika ĉelo.

POLEVOJ — Nu li aliros. Kaj krome estos pli bone, se li ne aŭdos komencon, ĉar ni parolos pri tiaj politikaj komplikaĵoj, kiujn li ne devas scii.

STUBE — Jen kio!

JARCEV — Jes. Ĉu vi estas informita pri la lasta demonstracio de la ŝipanoj de «Aŭroro»?

STUBE — Temas pri la rifuzo de ŝipanoj eliri en la maron kaj subiĝi al batalordonoj de la ŝipar-komando? Jes, tion mi scias.

JARCEV — Kaj plue estas ankoraŭ pli malbone. La sekur-polico eksciis, ke hoĉiaŭ dum tagiĝo la kroŝipo devas eliri en Peterburgon. La bolŝevikoj decidis utiligi ĝin, kiel batalan unuon en la pretiĝonta ribelo.

STUBE — Mi ne estas mirigita. De niaj abomenuloj oni povas ĉion atendi.

JARCEV — Do jen — bonvolu ekrigardi la havenkarton. Tio ĉi estas la rodo de rivero Neva. Vi vidas, ke, starante en tiu ĉi loko, la kroŝipo povas minaci per siaj multepezaj bombardiloj al la centro kaj cerbo de nia defendo — la stabo de militdistrikto kaj la citadelo de registaro — La Vintra Palaco. Bedaŭrindĉ, ni povas nenion kontraŭmeti al la kanonoj de la kroŝipo.

STUBE — Kaj la kontinenta artilerio?

JARCEV — Jen ĝuste tiurilate ni estas tre ĝenitaj; krom la junkra baterio kaj unu zenita baterio, la tuta garnizona artilerio estas jam plene propagandita de tiuj kanajloj; estos jam bone, se ili restos neŭtralaj.

POLEVOJ — Kaj la junkra baterio ne taŭgas por la batalo.

STUBE — La situacio do ne estas brila.

JARCEV — La situacio, laŭ la terminaro de niaj «kamaradoj», estas aĉega. Sed de ni dependos ĝin ŝanĝi.

STUBE — Kiamaniere?

JARCEV — Jen kiel. La konferenco de la ligo de patrio- kaj revolucio-defendo, speciale preparolis ĉiujn rimedojn kaj decidis...

(En la antaŭĉambro aŭdiĝas sonorilbruo).

Ĉu vi aŭdis? Oni sonorigas. Povas esti la ŝipanoj.

STUBE — Mi ne scias... mi ne pensas. Certe, tio estas iu de niaj.

POLEVOJ — Al mi ŝajnas, Leopoldo Teodoroviĉ, ke estos pli bone, se ni foriros en vian ĉambron.

STUBE — Senĉube. Polevoj, akompanu sinjoron kolonelon, kaj mi rigardos, kio okazis.

(La dua sonorilbruo. La ĉambristino iras tra la scenejon al la antaŭĉambro. Stube aŭskultas apud la pordo).

LA VOĈO de GODUN — Nu donu vian ĵaketon, Tatjana Eŭgenjevna, mi pen'igos ĝin.

30 STUBE — Hu... kanajlo...

LA VOĈO de TATJANA — Ne zorgu pri tio. Glaŝa, karulino, preparu por ni la ovaĵon. Mi estas tre malsata.

(Stube retiriĝas de la pordo kaj, kurinte tra la scenejo, malaperas en sian ĉambron. Eniras Tatjana kaj Godun).

TATJANA — (metas koltukon sur la seĝon) Kia terura kapdoloro.

GODUN — Ĉu vi tre laciĝis?

TATJANA — Jes, karulo. Estis terura deĵorado. Tri soldatoj mortis dum la nokto. Ĉu vi scias, Artem Miĥajloviĉ, povus ŝajni ke, laborante en hospitalo dum tri jaroj, mi devus fariĝi ŝton-trankvila, sed tute male—nun mi ne povas plu vidi tiujn ĉi kripligitajn homojn. Pro kio ĉi ĉio necesas? Kiam finiĝos tiu ĉi teruro?

GODUN — Bgatela demando, Tatjana Eŭgenjevna. Pardonu min, sed tiu ĉi demando estas demando ĉirektita en aeron.

TATJANA — Mi scias tion ĉi. Sed tiu ĉi scio neniem faciligas la situation. Kaj ĉu neniŭ scias, kiel fini tiun absurdan hommortigon?

GODUN — Ni scias.

TATJANA — Ĉu vi?

GODUN — Jes, ni bolŝevikoj. La afero estas simpla aritmetike. Kaj simplan aritmetikon ni tre bone komprenas. Jen vi nur pripensu. Vi estas bona virino, kaj vi ankaŭ trovos, ke nia aritmetiko estas scienco ĝusta. Tiuj, kiuj nin stampas per plej malestimindaj titoloj, volas mortigi milionojn da homoj, por ke miloj vivu komforte. Sed ni faros malon. La milojn ni mortigos por ke la milionoj povu vivi libere kaj labori. Kia rezulto do estos la ĝusta?

TATJANA — Ĉu ne estas eble fari tion, tiamaniere, ke mortu nek miloj, nek milionoj?

GODUN — Ankoraŭ tio ĉi ne estas ebla, Tatjana Eŭgenjevna. Tiel aranĝi la aferon ni ne povas. La virina koro estas kompatema kaj mi komprenas vin. Ni ankaŭ emis ĉeĉi al simila kompato. Sed ni ekvidis, ke ilia lupa naturo laŭ sia esenco postulas freŝan viandon. Do tie-ĉi por la kompato loko ne ekzistas.

(La ĉambristino alportas la pateton kaj kafbollilon kaj foriras)

TATJANA — Donu vian teleron, Artem Miĥajloviĉ.

GODUN — Dankon. Mi estas sata. Tamen mi povas iom sid'i kun vi, se vi volas.

TATJANA — Senĉube, mi volas. Kun vi mi sentas min simple kaj komforte, Artem Miĥajloviĉ. Nunatemp'e ĉirkaŭe ĉio rapidege kaj terure ruiniĝas; vi sola havas certan firmecon kaj bonkvalitan fortiĝecon.

GODUN — Tio ĉi estas tial, ke mi havas certan celon, Tatjana Eŭgenjevna. Mi flugas laŭ rekta linio, kiel bombo al sia celtabulo. Nuntempe nur tiuj sin gard'i povas, kiuj havas sian certan celon.

TATJANA — (Morgas. Godun sid'as, sin apogante sur la tablo, kaj rigardas Tatjanon.) Vi ĝuste ĉiris pri la certa celo. Vi bone ĉiris. Tio ĉi estas ĝusta, mi mem sentas min malbone pro tio, ke mi ne bone vidas mian celon; pro tio, ke la grundo sub mi komencas

ŝanceliĝi kaj ke mia vojo estas perdita. Tial mi ploras dum la nokto en la kusenon.

GODUN — Sed plori ne necesas. La ploro estas bagatela afero. Necesas kunpremi la dentojn kaj pugnigi la manojn kaj iri rekten — tra la arhostumpoj, tra diversaj baraĵoj kaj tra kampoj freŝlugitaj — kaj ĉiam iri nur rekte-antaŭen. Nur tiel estas trafebla la ĝusta vojo. (Ridas).

TATJANA — Kial vi ridetas?

GODUN — Venis en kapon afero iom ridiga. Jen mi jam fariĝis via instruisto. Jen vi min pri la angla lingvo instruis. kaj nun ankaŭ ĉe mi por vi ia instruo troviĝis.

TATJANA — Tre nature. Ĉiu ja scias ion bezonan por aliulo. Instruu min kaj mi honeste dankos vin.

GODUN — Mi estus ĝoja, Tatjana Eŭgenjevna vin instrui, sed mankas la tempo.

TATJANA — Kial do?

GODUN — De vi mi ne volas sekreti. Hodiaŭ nokte ni foriros al Peterburgo.

TATJANA — Ĉu la krezŝipo?

GODUN — Jes, tute ĝuste. Kial do vi ne demandas: kiacele?

TATJANA — (mallaŭte) Mi divenis.

GODUN — Ankaŭ ĝuste. Ĉu vi benas Artemĉjon Godun, aranĝi la mondon laŭ la bolŝevika aritmetiko.

TATJANA — Mi ne scias. Mi timas pensi pri tio.

GODUN — (starigante) Fari tion estas ankoraŭ pli terure. Tio ĉi ja okazos unufoje sur la tero. Povas esti post cent jaroj la homoj rin kiel sanktulojn estimos, aŭ eble tute male — malbenos. Estas ankoraŭ demando. Sed fari tion necesas... Nu jen... Mi diris ĉion kaj nun estas tempo por foriri. Tro multon mi devas ankoraŭ fari.

TATJANA — Ĉu jam?

GODUN — Jes, adiaŭ.

TATJANA — Mi ne amas tiun ĉi vorton. Ĝis la revido.

GODUN — Mi ankaŭ ĝin ne amas, sed uzas ĝin por ebla okazo. Certe, en Peterburgo oni nin renkontos per plumbaj bombonetoj. Kiu kaptos tian bomboneton per la buŝo, kiun ĝi pretertrafos — ni ne povas scii.

TATJANA — (nervoze) Ne parolu pri tio. Ĉiuokaze mi deziras al vi bonsukceson.

GODUN — Ĉu tutkore?

TATJANA — Jes.

GODUN — Nu, dankon pri bonkora vorto (donas al ŝi manon, turniĝas kaj iras al la pordo, sed haltas kaj senhezite aliras al Tatjana). Ha... Tamen mi devas al vi ankoraŭ ion diri. Kial do sekretigi?

TATJANA — Kion de sekretigi?

GODUN — Ne koleru, Tatjana Eŭgenjevna. Mi plu ne povas. Eble, ĉi tio ŝajnas al vi malspritaĵo kaj arogantaĵo, sed tamen mi devas al vi diri, ke vi fortligis min. (Silento. Tatjana mallevas kapon).

GODUN — Nur ne silentu. Insultu, forpeli min ĉamsaĝulon, sed ne silentu.

TATJANA — (ekscitiĝinte) Godun... ne diru... Vi estas bona, simpattia... Mi ankaŭ alĉutimiĝis al vi, vidu, mi ne timas tion diri. Nur nune mi nenion plu diros al vi... iru.

GODUN — (alproksimiĝante) Tatjana Eŭgenjevna... (Eniras Berse-neva. Godun, ekvidinte ŝin, ŝvingas la manon kaj forkuras).

BERSENEVA — Tanjo, kio okazis? Kial Artem Miĥajloviĉ tiel rapide forkuris?

TATJANA — Li rapidas sur krozŝipon (kunpremas la tempiojn).

BERSENEVA — Tanjo. Ĉu vi turmentiĝas? Ĉu estas al vi malfacile?

TATJANA — Bagateloj, panjo. Ne parolu pri tio.

BERSENEVA — Ĉu vi vidis Leon?

TATJANA — Ne, mi lin ne vidis, sed kio do?

BERSENEVA — Ĉu vi scias... mi volas al vi diri. Leo fariĝis enigmoplena. Strangaj malaperoj, strangaj vizitantoj.

TATJANA — Kiaj vizitantoj?

BERSENEVA — Denove oficiroj el Peterburgo alvenis. Polevoj kaj ankaŭ iu nova. Kiacele? Kion ili volas? Eble, vi interparolus pri ĉio kun Leo?

TATJANA — Estas jam tro malfrue, panjo. Eĉ ne penvaloras paroli kun li. Niaj vojoj disiĝis.

BERSENEVA — Ha, kiel ĉio ĉi estas malfacila kaj turmenta. Kia disfalo!

GLAŜA — (enkurante) Sinjorino, la konfitaĵo ekbolis. Estas necesa via helpo.

BERSENEVA — Tuj mi iros, Glaŝa. (Kisas Tatjanan kaj foriras. Tatjana ŝanĉeliĝas, sidiĝas sur la seĝon kaj faligas la kapon sur la manojn.)

ŜTUBE — (eniras) Tanjo, ĉu vi estas sola?

TATJANA — (mallaŭte) Kien vi diris?

ŜTUBE — Ĉu foriris tiu ĉi bandito?

TATJANA — (levante la kapon) Kiu foriris? Kion vi volas?

ŜTUBE — Godun... Aŭskultu, Tanjo, ĉu vi estas malsana? Vi aspektas tre pala.

TATJANA — Mi laciĝis post sendorma deĵorado. Mi havas kapdoloron. Ĉu vi pri Godun demandis? Jes, li foriris.

ŜTUBE — Dankon al Dio. Gast' en tempo malĝusta estas ŝtono sur brusto. Al mi venis amikoj kaj mi tute ne volas, ke ili renkontiĝu.

TATJANA — (aŭskultas, ne komprenante).

ŜTUBE — (alproksimiĝas) Vi kuŝiĝu por kelka tempo. Vi tre malbone aspektas.

TATJANA — (rekonsciiĝante) Lasu min, donu al mi trankvilon. Iru al viaj gastoj.

ŜTUBE — Nu, mi faris la proponon... (Foriras, levante la ŝultrojn).

(Tatjana sonorigas sonorilon, pendantan super la tablo. Eniras la ĉambristino).

TATJANA — Glaŝa, ordigu ĉion. Kaj poste iru apotekon kaj aĉetu du pulvorojn kontraŭ kapdoloro.

(Cambristino ordigas la ĉambron, eniras Ksenja, vestita en silkan kimonon).

KSENJA — Ha, mia estrino, Niobeo. Bonan vesperon! Ĉu vi venis de deĵorado?

TATJANA — Jes.

KSENJA — Kaj mi venis de banujo. Ĝi min tute revivigis. Jam la trian tagon ni drinkas ĉampanon.

TATJANA — Tre prudenta tempopasigo.

KSENJA — Je dio, ne malbona. Pli prudenta, ol malĝojo pri iuj mond-problemoj.

(Cambristino iras al la pordo).

TATJANA -- Ne forgesu, Glaŝa, aĉeti por mi la medikamenton.

KSENJA — Kial vi erinacas?

TATJANA — Kial vi, Ksana, posedas tian senceremonian tonon de stratvagulino? Vi havas dudek jarojn kaj oni povas pensi, ke vi jam spertis ĉion en la mondo.

KSENJA — Nu bone, se vin tio interesas, do dum du sekundoj mi parolos kun vi serioze. Vi volas scii—kial? Dank'al milito, al disfalo, al kaoso nuntempa. Kiam mi komencis vivi, la vivo disfalis. Mi nenion en vivo vidis, krom disrompo kaj turmento. Kaj ne havante tempon por ekflori, ni devas forvelki. Jen ĉio... Jes, ankoraŭ unu demando por vi. Glaŝa al mi diris, ke alveturis Voldĉjo.

TATJANA — Kia Voldĉjo?

KSENJA — Mia adoranto. Voldĉjo Polevoj, adjutanto de Polovcev. Glaŝa diris, ke li troviĝas ĉe Leo.

TATJANA -- Min ne interesas viaj adorantoj.

KSENJA — (alirante al ĉambro-pordo de Stube) Domaĝe. Sed min interesas la viaj. Parolo honesta, mi forlogos de vi vian Godun (foriras).

(Tatjana venas al fenestro kaj rigardas tra ĝi. El la antaŭĉambro aŭdiĝas sonorilbruo. Tatjana iras malfermi la pordon. Aŭdiĝas piedfrapado, frapado de pafilŝipoj kaj laŭtigita voĉo de T a t j a n a).

VOĈO de TATJANA — Kiuj vi estas? Kion vi bezonas?

VOĈO de ŜIPANO — Kie estas la oficiroj?

(Sur la sojlo aperas dorsiranta Tatjana, ŝin sekvas kvar ŝipanoj kun pafiloj).

TATJANO — Mi demandas vin, kion vi bezonas tie ĉi?

ŜIPANO — Se ni alvenis, sekve necesas. Montru al ni la oficirojn.

(El la pordo dum sekundo aperas kapo de Stube kaj tuj ree kaŝiĝas).

TATJANA — Kiajn oficirojn?

ŜIPANO -- Ci, sinjorineto, ne erarigu nin. Ni ankaŭ ion komprenas. Ĉe la havena albordejo malaperis de ni en la mallumo du rampobestoj. Sed tute egale — ili ne foriros de ni. Ĉiuj asertas, ke ili kaŝiĝis en tiu ĉi domo.

**34** TATJANA — (kun forto) Kaj pro tio vi kiel rabistoj perforte penetris

en tiun ĉi loĝejon. Tie ĉi neniam oficiroj estas, krom la kapitano Bersenev. Tiu ĉi estas lia loĝejo.

ŜIPANO — La loĝejo de Bersenev, de Eŭgenij Ivanoviĉ?

TATJANA — Jes.

ŜIPANO — Nu, ŝipanaro, turnu vin malantaŭen. Ne laŭ tiu vojo ni eknagiĝis. Returnen. Ni devojiĝis. Pardonu nin grandanime, sinjorino. (Foriras).

(Tatjana mordpremite la lipojn kaj apenaŭ starante, sin apogas al la tablo).

ŜTUBE — (eliĝinte el la pordo) Dankon, Tanjo. Vi estas bravulino. Bone vi ilin foririgis.

TATJANA — (rektiĝante) Ne danku. Mi tute ne devis eĉ pensi pri vi. Mi ne volas plu zorgi pri via savo. Mi nur timis, ke en nia hejmo estos verŝita sango. Mi mensogis, sed lastfoje. Gardu tion en la memoro. (Ŝi foriras).

ŜTUBE — Kaj ankaŭ por tio dankon.

JARCEV — (el la pordo) Ĉu ili foriris?

ŜTUBE — Feliĉe trapasis. La edzino ilin foririgis.

JARCEV — Estu la vojo por ili ĝojo. Estus tre aĉe, se ni kontraŭvole renkontus ilin. (Sonorilbruo).

ŜTUBE — Denove.

JARCEV — Diablo ilin prenu (malaperas en la pordo).

(Ŝtube singarde eniras antaŭĉambron kaj revenas kun Ŝvaĉ).

ŜTUBE — Kie ĉin tenis la diabloj ĝis nun? Kioma estas la horo?

ŜVAĈ — Pardonu min, via moŝto. Laŭ la stratoj necesis iri tre singarde. Kiam mi alproksimiĝas al via domo, mi ekvidis la ŝipanojn kun pafiloj. Apud via domo ili vagokuris. Nu, mi ektimis... mi atendis, ĝis ili foriris.

ŜTUBE — Nu iru rapide. Tie, la sinjoroj oficiroj vin atendas.

(Direktiĝas al sia ĉambro. En la pordo renkontiĝas kun elirantaj Polevoj kaj Ksenja).

ŜTUBE — Kien do, Vladimir Nikolaeviĉ?

POLEVOJ — Ni havas konversacion de du koroj.

ŜTUBE — Oni povas prokrasti... Ni ja havas gravan aferon.

POLEVOJ — La afero ne estas lupo, en la arbaron ne forkuros. Kaj krome mi havas nenion plu por fari kun vi. Restas teknikaj detalaĵoj kaj en ili mi nenion komprenas.

ŜTUBE — Nu, diablo estu kun vi.

(Ŝtube kaj Ŝvaĉ foriras. Polevoj prenas la manojn de Ksenja).

POLEVOJ — Feino de Balta Maro. Vi estas rave vestita en tiu ĉi kimono. Mi, imagas kiel vi aspektas sen ĝi. Do kiel?

KSENJA — Restas laŭ samo, kion mi jam diris, Voldĉjo. Ĝis kiam vi ne rakontos al mi, pri kio vi tricpe interflustris kun tiaj misteraj tivizaĝoj — kiam mi eniris, ĝis tiam vi nun ne nur senvestitan, sed eĉ en kimono ne ekvidos.

POLEVOJ — Indulgu min, diino de la rivero Neva. Nia interparolo ja estas ŝtata kaj milita sekreto.

KSENJA — La ŝtato — estas mi (ambaŭ aliras al kanapo kaj sidiĝas).

POLEVOJ — Mi komprenas, sed...

KSENJA — Sen iuj sed-oj (metas la kapon sur la ŝultron de Polevoj).

Ĉu vere mi havas agrablajn lipojn? Ĉu jes? Ĉu vi volas min kisi?

Ne... ne... Pli frue — komuniku vian sekreton.

POLEVOJ — Mi ne povas (provas ĉirkaŭbraki Ksenja-n).

KSENJA — For viajn manaĉojn! Mi diris al vi — miajn kondiĉojn.

POLEVOJ — Sed... Ksenja (provas stariĝi).

KSENJA — Ha tiel! Vi estas abomena, Voldêjo. Mi foriras kaj ne volas vin plu vidi.

POLEVOJ — (detenante ŝin) Nu bone. Sed vi ĵuros, ke al neniu vi diros eĉ unu vorton pri tio.

KSENJA — Mi ĵuras. Ĉu vi volas, mi kisas la kruceton (intence large malfermas kimonon sur la brusto kaj prenas la kruceton.) Jen mi kisas. Nu diru.

POLEVOJ — (ĉirkaŭrigardante) Hodiaŭ laŭ ordono de bolŝevika organizacio krosipo «Aŭroro» devas foriri Peterburgon. Sed ĝi ne foriros.

KSENJA — Kial do?

POLEVOJ — Ne, mi... ne povas diri...

KSENJA — Voldêjo...

POLEVOJ — Nu bone. Ĝi estos eksplodigita...

KSENJA — Kiel eksplodigita?

POLEVOJ — Diablo ĝin scias. Mi tion ĉi mem ne scias. Nu, estos submetita iu eksplodilo, ŝajne, sub la torpedejon kaj «Aŭroro» suprenflugos en aeron.

KSENJA — Kiam do okazos tiu ĉi suprenflugo?

POLEVOJ — Ĉe la mateniĝo.

KSENJA — Tiel do! (Paŭzo) Kiel vi pensas, ĉu de nia tegmento oni povos ĉi-tion vidi?

POLEVOJ — Kion?

KSENJA — Kion... tiun ĉi eksplodon.

POLEVOJ — (distrite) Mi ne scias. Certe. Sed kio do?

KSENJA — Nu, mi nepre iros sur la tegmenton.. Tio ĉi devas esti interesa kaj timiga bildo. Simila al Nerono dum la brulo de Romo.

POLEVOJ — Ĉu vi rigardos?

KSENJA — Nu jes. Mi neniam vidis naturan eksplodon de krosipo. Nur filmon similan mi vidis (paŭzo). Nun vi povas ricevi la rekompencon, Voldêjo.

(Polevoj ĉirkaŭbrakas ŝin kaj kisas. Aŭdiĝas la voĉoj el la pordo. Polevoj saltleviĝas).

STUBE — (enirante kun Jarcev kaj Ŝvaĉ) Jes, sinjoro kolonelo.

JARCEV — Nur estu treege singardema, Leopoldo Teodoroviĉ. Malprospero ne devas esti. Morgaŭ estos jam malfrue.

STUBE — Mi komprenas.

JARCEV — Nu, donu al vi dio sukceson kaj bonfarton.

ŜTUBE — Mi dankas. (Al Ŝvaĉ) Tenu en la memoro, inter la duono de la dekdua kaj la dekdua apud la flagmasto... Kaj nun akompanu la sinjorojn oficirojn tra la kuirejo kaj la dua korto... Sed antaŭe rigardu la straton, por ke ne renkontiĝu la patrolo.

ŜVAĈ — Laŭ ordono, via moŝto.

KSENJA — Voldĉjo, morgaŭ mi alveturos Peterburgen kaj vi veturos kun mi al Pavlovsk.

POLEVOJ — Mi estos tre ĝoja. Ĝis la revido, plej alloga el la virgulinaj.

ŜTUBE — (al Jarcev) Mi ankaŭ iros, sinjoro kolonelo. Resti hejme estas sence. Denove povas veni iu ĉifonulo, kaj tiam ĉio ekflugos al diabloj. Ksana, se iu min demandas, diru ke mi foriris klubon. Ĝis la revido, sinjoroj.

JARCEV — Bonan vojon! (Ĉiuj disiras, Ŝtube en antaŭĉambron, Ŝvaĉ kaj oficiroj en alian pordon. Ksenja aliras al la murspegulo.)

KSENJA — Malsaĝulo-bubo. Eĉ kisi ne povoscias. Nur salivigis min. (Mall. ŭte eniras Tatjana).

TATJANA — Kiu interparolis tie ĉi? Mi kuŝiĝis ripozi kaj la interparolo min vekis.

KSENJA — La gastoj de Leo foriris.

TATJANA — Kaj ĉu Leo estas hejme?

KSENJA — Ne, li foriris al klubo.

TATJANA — Domaĝe (returniĝas por foriri).

KSENJA — Atendu. Ĉu ĉe vi troviĝas la paĉja marbinoklo?

TATJANA — Jes. Ĝi estas en mia ĉambro.

KSENJA — Ĉu vi povas doni ĝin al mi hodiaŭ?

TATJANA — Bonvolu. Ĉu vi volas iri en teatron? Estas jam malfrue, la deka horo.

KSENJA — Ne en teatron, mi volas suriri la tegmenton.

TATJANA — Kien?

KSENJA — Sur la tegmenton.

TATJANA — Kiacele?

KSENJA — Tio ĉi estas ŝtata sekreto.

TATJANA — (rapide alirante) Ĉu ŝtata sekreto?

KSENJA — Nu jes, al mi diris Voldĉjo, kaj mi ĵuris, ke mi al neniu diros.

TATJANA — Vi ĵuris? Kion do? Tuj diru.

KSENJA — Sed mi ne povas.

TATJANA — Vi diros. Alie mi malfermos la fenestron kaj kunvokos la tutan straton, mi alvokos la ŝipanojn.

KSENJA — Kio estas al vi? Vi havas tiajn frenezajn okulojn? Ne rigardu min tiel.

TATJANA — (furioze) Diru. Estu, almenaŭ, unufoje honesta... Fratino... Mi scias, mi suspektas la projektatan krimon, kiu povas dispremi tutan nian hejmon, kiu povas alporti morton kaj pereon. Ĉu vi aŭdas? La krimon.

KSENJA — Kian rilaton tio havas al ni? Ili volas eksplodigi «Aŭronon». Mi nur volis rigardi tion de tegmento

TATJANA — (kun forto forpuŝas Ksenjan) Ĉu vi... de tegmento... tra la binoklo la eksplodon... la ekstermon de centoj da homaj vivoj... la morton de propra patro..

KSENJA — (pripensante) Dio mia... mi tute forgesis, ke la paĉjo estas kapitano de «Aŭroro»... sed li havas kutroñ.. li sukcesos forveturi...

TATJANA --- Silentu. Nek unu vorton plu. Mi malamegas ĉiujn senanimajn, malhonestajn. senindulgajn... paĉjo... paĉjo... (forkuras en la antaŭĉambron).

KSENJA — (distrite) Tatjana... Tanjo... mi ne estas kulpa... Mi ne volas eksplodigi paĉjon... Mi timas.... Mi estas malsaĝa... mi ne-nion komprenas en tiu ĉi malbenita politiko.

(Kurteno falas)

## KVARA AKTO

Dekoracio estas tiu de la dua akto. Sur la rodo briletas fajroj de aliaj ŝipoj. Jufajo la horizonton traigas radioj de projekciilo. La ferdeko estas malluma, nur super la enirejo en la oficirajn kajutojn malhale brilas lampeto. Aŭdiĝas fajlado de vento kaj bruoj de ondoj. Apud la surŝipen kondukanta ŝtuparo troviĝas gardostaranto kaj maljuna ŝipano.

GARDOSTARANTO --- Sekve, Mitriĉ, dum la nokto ni foriros al Peterburgo?

MALJUNA ŜIPANO — Sekve, ni foriros, neveto.

GARDOSTARANTO — Tamen estas iom time. Kiel do iri kontraŭ la siaj. Certe, necesos pafi kontraŭ ili.

DEĴORESTRO — (de la komando-ponteto) Gardostarantoj, ĉirkaŭrigardu!

GARDOSTARANTO --- Laŭ ordono. Ni rigardas (paŭzo). Do kiel, Mitriĉ?

MALJUNA ŜIPANO — Vi diris kontraŭ la siaj. Do kie vi la siulojn trovis? Ĉu inter la burĝoj? He, vi estas ankoraŭ suĉbovido.

GARDOSTARANTO — Kvankam ili estas burĝoj, sed tamen laŭ nacio —niaj rusoj.

MALJUNA ŜIPANO — Laŭ nacio, certe, rusoj, sed tamen vi havas cerbon mallarĝan. Komencinte iri, ne rajtas vi vin retiri. Iam estis mi ankaŭ simila laktuĉulo en Nigra Maro sur la ŝipo «Prieco Potemkin»<sup>6</sup>. Kaj tie okazis la samo. Kiam alvenis ni post la ribelo, mortiginte niajn oficirojn, al Odeso, ni povus fari grandajn aferojn, se ne la komato nia malsaĝa. Generalo Kofanov en la urbo pasmortigis la laboristojn multamase, sed ni timis kanonadi la urbon. Ni same kiel vi pensis—certe, ili estas burĝoj, sed tamen la siaj, la rusoj. Pro tio ni pereis poste en Rumanujo, kiam nin en Teodosio tiuj ĉi siaj kiel leporojn pafpersekutis. Do vi tenu en memoro, junuleto,

se vi la pafilon levis, do senbezzone — ne timiĝu. Pafu rekte al la koro, se eĉ la propra patro kontraŭstaros vin. Nur tiam vi la veran liberon akiros, kiam la kompaton vi el via koro forpelos kaj justan finalan koleron trovos.

GARDOSTARANTO — Atentu, Mitriĉ. Ĉu ne la remilo plaŭdis en proksimeco. Iu remas (aŭskultas).

MALJUNA ŜIPANO — Ne... ekŝajnis.. He junulo, unu ĉagreno min premas... Ne ĝisvivis mia kara kamarado, heroo de krozŝipo «Potemkin», ĝis venĝopuno preparita por niaj rampobestoj. Pendigis lin ekzekutistoj, estu ili trioble malbenitaj... Sed se li ĝisvivus, ĝojus li nun... Ĝusta bubo li estis.

(El la turo ŝtelire eliras Ŝvaĉ kaj nerimakita aliras al interparolantoj).

ŜVAĈ — Kiu estas tie ĉi?

MALJUNA ŜIPANO — Fi, malpura forto.... grimpas vi kiel katino... plensilente.

ŜVAĈ — Vi, Mitriĉ, iru malsupren, kamarado. Vi scias la ordonon de komitato, ke sur la ferdeko neniu vagu. Ĉu vi ne estas organizita ŝipano? Vi ja pretendas esti malnova porpopola luktanto «potemkinano».

MALJUNA ŜIPANO — Kaj vi min ne instru. Mi bone komprenas la organizitecon... Mi eliris nur por la pipon ekfumi, kaj jen la bubon instruis. Kaj nun mi povas foriri (foriras).

Ŝvaĉ deiras al ŝipa postparto, sin apogas sur la balustradon de ŝiprando kaj fikse rigardas en la mallumon).

GARDOSTARANTO — Ĉu nenion vi vidas?

ŜVAĈ — (rapide returniĝas) Kion mi ne vidas?

GARDOSTARANTO — Ekŝajnis al mi antaŭ unu minuto, kvazaŭ iras ŝalupo... La remiloj proksime plaŭdis...

ŜVAĈ — En ciaj oreloj, neplenaĝa hubaĉo, io plaŭdis.

(Foriras de ŝiprando kaj alproksimiĝas al gardostaranto).

GARDOSTARANTO — Ĉu baldaŭ estos deĵorsanĝo?

ŜVAĈ — Kiam ĝi alvenos, tiam ĝi estos. Ĉu vi jam perdis la paciencecon?

GARDOSTARANTO — Mi timas ion... Premegas min ia sopiro...

ŜVAĈ — (serĉante en la poŝo) He, diablo ilin prenu.

GARDOSTARANTO — Vi pri kio?

ŜVAĈ — Alumetojn mi forgesis. Ĉu vi ne havas?

GARDOSTARANTO — Mi havas.

(metas la pafilon al ŝiprando, prenas el la poŝo skatolon kun alumetoj, bruligas alumeton, kovrante ĝin per la mano. Ŝvaĉ, rigardinte malantaŭen, per rapida bato de revolvertenilo frapas kapon de la gardostaranto. Gardostaranto falas sur la ŝiprandon, Ŝvaĉ transjetas liajn piedojn trans la ŝiprandon. Aŭdiĝas mallaŭta akva ekplaŭdo).

ŜVAĈ — Glutu akvon ĉi, laktsuĉulo. (Kuras al ŝipa postparto, klinas sin trans la ŝiprandon). Via moŝto... via...

VOĈO EL POST LA ŜIPRANDO — (mallauĉe) Donu la ŝnuron.  
ŜVAC — Laŭ ordono.

(ĵetas ŝnuron. Post unu sekundo — Ŝtube ŝipanvestita transsaltas la ŝiprandon).

ŜTUBE — Kial ĉi, hundo, prokrastis? Estis ja forta ondiĝado. La ŝalupo estis preskaŭ superakvita, apenaŭ mi sukcesis alremi.

ŜVAC — Pardonu, via moŝto. Estis maloportune. Oni malhelpis...

ŜTUBE — Maloportune... ĉi, diabla piprujo. Ĉu neniu vidis?

ŜVAC — Jes, neniu vidis.

ŜTUBE — Ĉu vi ĉion antaŭpreparis?

ŜVAC — Laŭ ordono. La kelo estas malfermiĝinta.

ŜTUBE — Bravulo vi estas. Rekompenceon vi ricevos.

ŜVAC — Mi ĝojas komplezi.

ŜTUBE — Pli mallauĉe. Ĉu ĉi frenezigiĝis, ĉi idioto. Ĉi kriegas, kiel sur la bazaro. Nu estas jam tempo por agi. Iru antaŭen. Se io okazos — fajfu.

(Foriras. Antaŭe ŜvAC, poste Ŝtube).

DEĴORESTRO — Gardostarantoj ĉirkaŭrigardu.

VOĈO TRANS LA SCENEJO — Laŭ ordono. Ni rigardas.

(Paŭzo. Tra la fajfado de vento aŭdiĝas motorbruo de aliranta kutro. Aŭdiĝas dufoja alvoko... Hej... Sur Aŭroro... (paŭzo). De la supra ŝtuparo sur la ferdekon venas Godun kaj Bersenev).

GODUN — Jen hundoj. Ha! Neniu estas! Ili dormegas. Kanajloj. Nu mi punos ilin. (prenas fajfilon. Fajfas).

DEĴORESTRO — (de la komandoponteto) Kial vi fajfas?

GODUN — Deĵorestro tuj venu ĉi tien.

DEĴORESTRO — (Malsupreniras de komandoponteto kaj alirante rekonas Bersenev. Metas la manon ĉe ĉapŝirmilo kaj raportas).

DEĴORESTRO — Sinjoro kapitano. Dum la dua deĵorado sur la kromŝipo nenio okazis.

BERSENEV — Ne okazis? Kaj kie estas la gardostaranto? Kial oni ne observ-vokas alvenintajn ŝalupojn?

DEĴORESTRO — Ĉu la gardostaranto? Ja li estis tie ĉi. Antaŭ tri minutoj mi kontrolis la deĵorantojn kaj ili respondis.

BERSENEV — Strange. Kie do li estas?

GODUN — (kolere) Nu kie do? Ĉu li degelis? Ĉu iu ŝtelis lin? Kial vi staras kiel arbotumpo? Trovu la gardostaranton.

(Bersenev rimarkas fajfilon apud la ŝiprando).

BERSENEV — Kaj kio estas tio?

DEĴORESTRO — La fajlo.

GODUN — Certe, sed ĉi eble pensas, ke tio estas tea kulero... diablo ĉin prenu... Ĉu ĉi estas ebria?

DEĴORESTRO — Permesu, kamarado Godun...

GODUN — Nenion mi permesos. Ĉu ĉi estas respondeca pri la deĵorado aŭ mi?

**40** DEĴORESTRO — Mi estas respondeca.

GODUN — Tial do trovi tuj la gardostaranton. El sub la tero, el sub la akvo, serĉu, alie mi ĉin ĉe ĉiaj piedoj sur la digon pendigos.

BERSENEV — Nekomprenehla afero. Ĉu tio ĉi estas malfeliĉa okazintaĵo? Ĉu li falis trans la ŝiprandon? Sed kial la pafilo estas akurate starigita? Ĉu li mem sin ĵetis en la akvon? Sed kial do? Estas pli verŝajne, ke li foriris.

GODUN — Mi montras al li, kiel foriri. Mi lin sub akvon starigos por deĵorado.

BERSENEV — (al deĵorestro) Voku tuj la gard-deĵoron!

DEĴORESTRO — (fajfas, alkuras Ŝvaĉ) Boatisto, alĵafu la gardo-deĵoron.

ŜAĴAĈ — Laŭ ordono (fajfas la alarmon de gardodeĵoro).

GODUN — Kion vi volas fari, Eŭgeno Ivanoviĉ?

BERSENEV — Senprokraste traserĉi la kroŝipon.

ŜVAC — (flanken) Jen kia okazo... Preterpasu min forto satana...  
(Enkuras gardodeĵorantoj kun gardestro kaj viciĝas en du vicoj).

GODUN — (al deĵorestro) Vi estas arestita. Poste ni klarigos la kaŭzojn.  
(Al gardestro). Arestu lin. Forkonduku lin en karceron.

(Du gardodeĵorantoj stariĝas apud la deĵorestro kaj forkondukas lin.  
La ferdeko pleniĝas per ŝipanoj).

VOĈOJ — Kial? Kio okazis? Kial? Kiu alvokis? Nekompreneble. Estas mallume kiel ĉe negro...

GODUN — Kiu al vi permesis kunveni. Ĉu sen vi ni ne aranĝos la aferon? Iru vi al viaj lokoj.

3-a ŜIPANO — Ĉu estas vi, Artem? Kio okazis?

GODUN — De vi ne estis demandita la permeso. Iru.

2-a ŜIPANO — Do kio okazis kun vi? Ĉu vi freneziĝis? Ĉu vi estas malnova admiralto? Se la ŝipanaro ekscitiĝas, vi devas klarigi. Por tio ni vin elektis.

3-a ŜIPANO — Alie oni povas ĉin forpeli.

GODUN — Ne rezonu... mankas la tempo. La gardostaranto malaperis.  
(Moviĝo kaj obtuza bruo en la amaso).

5-a ŜIPANO — Kien li malaperis?

GODUN — Li ĉielon forflugis kiel la sankta spirito. Li sanktuliĝis, malsaĝa ĉia kapaĉo... Necesas serĉi... Boatistoj kunvoku la ŝipanojn, palpserĉu kroŝipon en ĉiuj anguloj. Fermu la pordojn. La aliaj iru al siaj lokoj.

ŜVAC — (faras krucosignojn, flanken) Dio mia... ili trovos... mi pereis. (Laŭte) Kamarado Godun mi pensas, ke antaŭe necesas aresti la sinjoron kapitanon kaj poste la kroŝipon traserĉi.

GODUN — Kio? Kiu tie ĉi similaĵon babilas?

ŜVAC — Ne pre necesas. Tiu ĉi afero kun la gardostaranto estas afero de la kapitano, ne alie.

GODUN — Silentu!

ŜVAC — Ĉi ne kriegu. Ne granda persono ĉi estas. La ĝuston mi diras, ĉar la informojn mi havas.

3-a ŜIPANO — Atentu, Artem, lasu lin paroli. Povas esti, ke li veron parolas. Povas esti, ke li ion scias (La ŝipanoj dense ĉirkaŭas la trion — Bersenev, Ŝvaĉ kaj Godun).

GODUN — Nu diru ci, flavruĝa hundido. Sed se ci mensogos...

BERSENEV — Atentu... Ne necesas, kamarado Godun, mi lasas la postenon de komandanto (movi, mirego, ekkrioj inter la ŝipanoj).

GODUN — (mirigite) Eŭgeno Ivanoviĉ, kio okazis kun vi?

VOĈO — (el malantaŭe) Ĉu li ektimis? Kial per la vosto ferdekon balai?

BERSENEV — Mi povas komandi la krozŝipon nur kondiĉe, se ekzistas plena kaj reciproka konfido. Sed kiam ekaperas iuj suspektoj, kiuj makulas mian honoron, mi lasas mian postenon. Min pravigi pri io mi ne volas.

(Movi, voĉoj: «Ha! jen kio!»).

GODUN — Vi estas malprava, Eŭgeno Ivanoviĉ. Ne vere vi parolas. Tia konduto estas malbona. Ĝi devenas de via nobela fiereco. Se senpekulo sin pravigas, — en tio estas nenio honto. Kaj nun ni povas ĉiujn suspekti. La tempo estas tia... uragana tempo.

BERSENEV — Mi diris, ke ĝis sinpravigo mi ne maldigniĝos. La krozŝipon mi plu ne komandas.

(Movi, voĉo: «Kaj ni vin ne bezonas; ni ankaŭ sen vi ĉion bonarangos»).

MALJUNA ŜIPANO — (antaŭenpaŝinte) Pardonu min, Eŭgeno Ivanoviĉ. Aŭskultu mian maljunan ŝipanan parolon. Vi mem scias, ke inter ni kaj vi malamikeco ne ekzistas. En Helsingforsio ni multajn oficeirojn sub la akvon lasis, sed vin ni eĉ per unu fingro ne tuŝis. Ni mem elektis vin kiel mian komandanton. Se ĉiuj oficeiroj estus tiaj, kiel vi, tiam ne necesus batali. Kaj nun, kiam ni kune iras por nia afero, ni devas pri ĉiu el ni ĉion scii. Ne montru tian fieron antaŭ la ŝipanoj.

GODUN — Veron ci diras, Mitriĉ. Pripensu pri tio, Eŭgeno Ivanoviĉ. Tute egale ni ne kredos intrigojn (Al Ŝvaĉ) Nu parolu ci, flavruĝa kreitaĵo.

ŜVAĈ — Mi ĉion diros. Mi ne permesos plu trompi la ŝipanojn. Mi ankaŭ estas konscia kaj mi ankaŭ simpatias al la bolŝevika partio.

GODUN — Pri la partio vi silentu, pri la afero diru. Sed tenu en memoro, se vi mensogos, vi povas jam nun antaŭmendi por vi rekvieron.

ŜVAĈ — (ĉirkaŭrigardante, kun furiozo) Ŝipanoj, aŭskultu. Oni trompas vin kaj vi estas kiel ŝafoj en la brutaro. Manojn premas al vi sinjoro kapitano Bersenev. Li ŝajnigas sin kvazaŭ frato de la ŝipanoj. Li kvazaŭ defendas liberecon de la ŝipanoj; kaj dume en lia hejmo la oficeiroj kontraŭ-revoluciaj kunvenas, pensas kaj cerbumas, kiel tiun saman liberecon neniigi, en la maron ĝin dronigi.

GODUN — Ci mensogas rampobesto.

ŜVAĈ — Kiacele do mensogi? Kion mi profitos de mensogo? Mi mem hontas, ke, laŭ antaŭreĝima kutimo obei, mi silentis ĝis nun. Mi ŝajnis min, kvazaŭ mi estas lia kunkulpulo. Mi pentas, ŝipanoj. Hodiaŭ nokte el la loĝejo de kapitano mi forkondukis du oficeirojn

tra la kuirejo kaj la dua korto — por eviti deĵorpatrolon. Estis du oficiraj, — unu kolonelo kaj unu leŭtenanto (Bersenev faras rapidegan movon).

GODUN — (kaptante Ŝvaĉon ĉe la gorgo) Ĉi mensogas. Mi sufokos ĉin.  
ŜVAĈ — Pereu mi sur tiu loko... Krevu mi, se mi mensogas.

(Inter la ŝipanoj pligrandiĝas la bruo. Voĉoj — jen kia estas Eŭgeno Ivanoviĉ! Sekve li nin trompis).

GODUN — (forpuŝas Ŝvaĉon) Iru for, mi ne kredas. Eŭgeno Ivanoviĉ, diru vi mem... Mi ne kredas al la flavruĝa felo de boatisto. Respondu vi mem. Kion vi diros, al tio mi kredos.

(Paŭzo. Intensa silento kaj atento).

BERSENEV — (mallevinte kapon) Mi ne scias... Povas esti, ke tio estas vero.

GODUN — Ĉu vero?

BERSENEV — Povas esti.

3-a ŜIPANO — Kiel tiel «povas esti». Ĉu tio okazis aŭ ne?

5-a ŜIPANO — Ne erarigu nin.

BERSENEV — Mi ne scias... Se la boatisto diras, sekve tio okazis.  
(Eksplodo de krioj).

5-a ŜIPANO -- Kion do tio signifas, ŝipanoj? Ĉu li mokas nin?

6-a ŜIPANO — Pli bone vi konfesu ĉion mem, alie ni devigos.

2-a ŜIPANO — Nia komandanto — trompisto.

(Ŝipanoj ĉirkaŭas Bersenev)

ŜVAĈ — (flanken) Dume mi sukcesis... Savu dio.. Necesas nur prokrasto...

GODUN — (flanken puŝas la ŝipanojn, kun ekscitiĝo al Bersenev) Kion do tio signifas, Eŭgeno Ivanoviĉ? Mi kredis al vi, kiel al mi mem kiel al dio, kaj vi... vi prenis alian direkton. De nia vojo vi devigiĝis. Mi diris al vi antaŭ nelonge, kiam ni akompanis la admiralon: rifuziĝu... lasu nin, se vi ne havas forton iri kontraŭ la siaj. Mi tion diris. Se vi estus honeste foririnta tiutempe, neniu al vi iun malbonan vorton dirus... kaj vi... tiam vi premis mian manon por komuna laboro, por komuna vojo... kion do fari nun kun vi... Kion do? Ĉu efektive vi nin perfidis?

BERSENEV — (ekstreminte) Godun...

GODUN — Kion do — Godun? Sufiĉas. La afero estas finita. Nenio estas plu farebla. Estos alia komandanto. (Al gardestro) Arestu lin.  
(La gardostarantoj stariĝas apud flankoj de Bersenev) Forkonduku lin ĝis morgaŭ.

(La krioj el la anaro de ŝipanoj)

3-a ŜIPANO -- Kien forkonduki?

2-a ŜIPANO — Kial ĝis morgaŭ? Necesas tuj juĝi, sur tiu loko mem.

5-a ŜIPANO — Necesas scii, kion volis fari la Judaso?

4-a ŜIPANO — Metu pezaĵojn sur la kolon kaj rulu lin sub akvon.

6-a ŜIPANO — Finu, ŝipanoj; necesas likvidi la rampobeston.

(Ŝipanoj sin ĵetas al Bersenev)

GODUN — (stariginte antaŭ Bersenev, krias) Atendu. Mi ne permesos, Venĝopuno tuja ne necesas. Antaŭe min mortigu, sed, ĝis kiam ni estas viva, mi ne permesos. (Interlukto, krioj).

5-a ŜIPANO — Trenu Artemĉjon ĉe piedoj.

VOĈO — (de la komandoponteto) — Kutro estas apud la ŝipbordo. (Ĉiuj trankviliĝas, lasinte Bersenev. Silento. Ĉiuj ŝetas sin al ŝiprando. Pala Bersenev kun fermitaj okuloj apogas sin sur la balustradon de la kajutsubirejo).

5-a ŜIPANO — Haltu! Kiu plaŭdas?

6-a ŜIPANO — Diru do, diablo vin prenu. Mi pafos.

VOĈO — (el post la ŝiprando) Centrobalt.

(Silento).

GODUN — Deĵorantoj... (deĵoranto sinĵetas al la surira ŝtupetaro, apud kiu ekbrilas elektraĵ lampetoj).

GODUN — (Ĉe la surira ŝtuparo) Kiu venas?

VOĈO — (el post la ŝiprando) Estas la niaj... Centrobalt... Kamarado Panov.

(Sur la ferdeko aperas Panov, poste Tatjana, kiun tenas ĉe la brako ŝipano. Movo. Surprizo).

3-a ŜIPANO — Jen malpura forto! Ino alvenis.

4-a ŜIPANO — Jen novaĵo.

GODUN — Saluton, bubo. Kial vi alvenis? Kiaccele?

PANOV — Saluton, Artem. Venu tien ĉi por unu minuto.

(Tatjana, irante post Panov, ekvidas inter la disiĝintaj ŝipanoj sian patron kaj kuras al li).

TATJANA — Patro!

BERSENEV — (ne komprenante) Ĉu vi, Tanjo? Kial vi venis ĉi tien?

(Tatjana silentas kaj premiĝas al patro).

PANOV — (duonvoĉe) Ĉu ĉio ĉe vi estas honestata?

GODUN — Ne tute. Sed kio do estas?

PANOV — Mi mem ne komprenas. Ni kunsidiis, kiam alkuris al ni tiu ĉi sinjorineteto... Ŝi histerie kriis... «Aŭroro... Oni eksplodigos ĝin... Aŭroron»... Ŝi estis kvazaŭ freneziĝinta... Ŝi ploris... ŝiris sian hararon, estis tute freneza... ni trinkigis ŝin per akvo... tio ne helpis... ŝi daŭrigis krii: «la tempon vi perdas... pli rapide... edzo... torpedejoj... kelo... oficira organizo». Unuvorte ni nenion komprenis... Pri iu boatisto flavruĝa ŝi parolis. (Ŝvaĉ, staranta apude, ekstremas, retiriĝas kaj rapide malaperas). Ni nenion povis kompreni kaj decidis, ke mi devas ŝin akompani al krozŝipo por kontroli la aferon. Virino estas virino, sed la diablo faras ofte nekonvenajn ŝercojn... Povas esti, ke ŝi deliris, sed povas ankaŭ esti...

GODUN — Atendu. Mi komprenas. Nun unu sekundo pli valoras ol dekrublo. (Al ŝipanoj) Kuru en torpedejon... tuj... Panov, kuru kun ili.. Se vi iun trovos, trenu lin vivantan tien ĉi..

(Panov kun ŝipanoj forkuras post la turon. Godun turnas la kapon).

GODUN — Ŝvaĉ... Ŝvaĉ (al aliaj ŝipanoj). Kaptu la flavruĝan hundiĉdon.. Por ke li estu ĉi tie. (La restinta ŝipano forkuras).

GODUN — (aliras al Bersenev kaj Tatjana) Ha, Eŭgeno Ivanoviĉ, kial-  
cele vi silentis? Al kiu la oficiroj venadis?.. La nobeleco ne permesis.

Kaj pro tiu ĉi nobeleco vi preskaŭ donis sin al morto.

TATJANA — Kio do okazis ĉi tie?

GODUN — Kio okazis — tio forpasis. Plu ne revenos.

(Proksimiĝas obtuza bruo. Ŝipanoj trenas sur la scenejon Ŝtubon).

1-a ŜIPANO — Ruliĝu do, ruliĝu do, rampobesto.

3-a ŜIPANO — Ha, li mordas, hundido.

4-a ŜIPANO — Eknatu lin...

5-a ŜIPANO — Per la genuo...

ŜTUBE — (krias) Ne kuraĝu min bati. Vi estas malnobluloj.

4-a ŜIPANO — Nu, ne insultu...

TATJANA — (faras movon por sin ĵeti al Ŝtuboj) Leo...

BERSENEV — (detenante ŝin) Tanjo, jam estas tro malfrue.

(La ŝipanoj tenas Ŝtuben antaŭ Godun)

2-a ŜIPANO — En la torpedejo mem ni kaptis lin.

5-a ŜIPANO — La bruloŝnuron li jam alfaris... Proksimume post du  
horoj, dum plena mariro ni flugus supren al maraj diabloj.

GODUN — (al Ŝtuboj) Do vi malgajnis la ludon, via moŝto. Kiu helpis  
al vi?

(Ŝtuboj silentas. Godun elprenas revolveron)

GODUN — Diru, kiu helpis, alie mi vin tuj mortpafos.

TATJANA — (senespere) Godun... ne faru tion... Godun...

GODUN — (turnas kapon) Nu, kio do? Ĉu vi ekkompatis lin? He vi!

TATJANA — Ja mi vin avertis. Mi sendaŭgerigis tiun atenceon... Indulgu  
lin.

BERSENEV — (penante forkonduki Tatjanan) Tanjo, ni iru... Vi  
ne devas resti ĉi tie.

TATJANA — Godun, indulgu lin.

ŜTUBE — Silentu. Mi malamas vin. Mi ne volas indulgon el viaj  
manoj.

(Enkuras aliaj ŝipanoj kun Panov, ili trenas kun si Ŝvaĉon)

GODUN — Starigu lin apud Ŝtuboj.

(Oni starigas ilin apude)

BERSENEV — Tatjana, foriru.

GODUN — (al Bersenev) Forkonduku ŝin. Mi nenion povas fari... Vi  
mem komprenas... Panov, helpu...

(Bersenev kaj Panov forkondukas Tatjanon. Senfortiĝinta, ŝi foriras).

GODUN — Nu, ŝipano, mi donas ilin al via juĝo.

(Komuna krio: «Morton al ili. Trans la ŝipandon!»)

GODUN — Finu, ŝipanoj (faras geston de supre malsupren).

5-a ŜIPANO — Komencu ŝipanoj. Ni finu kun ili unumove.

(La ŝipanoj sin ĵetas sur Ŝtuboj kaj Ŝvaĉ. Mallonga lukto apud la ŝi-  
prando. Du korpoj laŭvice flugas supren kaj falas trans la ŝipandon)

ŜVAĈ — (krias) Kamaradoj, ŝipanoj, indulgu... mi plu ne...

MALJUNA ŜIPANO — Kriu, kriu, tute egale... ni ne indulgos. Dank'al tiaj sentaŭguloj, kiel ci, pereis la krozŝipo «Potemkin».

4-a ŜIPANO — Naĝu nur...

3-a ŜIPANO — Saluton portu al ondinoj.

5-a ŜIPANO — Nu, ĉio estas finita, ŝipanoj.

KRIO — (de la komandoponteto) Godun... kamarado Godun...

GODUN — Nu, kio do?

RADIISTO — (kuras de la ponteto) Ĵus alvenis radiogramo de Centrobalt...<sup>9</sup> Estas ordono senprokraste foriri Petrogradon.

GODUN — Donu (ŝiras la paperon el la mano de radiisto kaj legas. Ŝipanoj ĉirkaŭas lin. El la subirejo de oficiraj kajutoj aperas Tatjana, sin apogante sur la manon de Bersenev, ilin sekvas Panov).

TATJANA — (foriras de Bersenev kaj faras kelkajn paŝojn al Godun) Artem Mihajloviĉ.

GODUN — (legas, ne aŭdas).

TATJANA — Godun, kie li estas?

GODUN — (ĉesante legi) Kiu?

TATJANA — Kie li estas?

GODUN — (per abrupta gesto montras trans la ŝiprando) Li estas tie... (Tatjana silente mallevas la kapon kaj staras ŝtoniĝinte).

GODUN — (eksvingiute la paperon) Ŝipanoj, ni foriros Petrogradon. Fine ni ĝisatendis la feston... (aŭdiĝas ĝojaj krioj de ŝipanoj).

MALJUNA ŜIPANO — Ankaŭ mi ĝisvivis la helan tagon. He, miaj mortigitaj karamadoj de Potemkin — estu pacaj viaj animoj...

GODUN — (turniĝante al Bersenev) Eŭgeno Ivanoviĉ, nun ne estas tempo por ofendiĝi. Nune ni la teron renverse starigos. Ni iros antaŭen, renkonten al la ventego, al la uragano, al difinita disrompo. Komandu debordiĝon.

BERSENEV — Bone, Godun. Poste ni faros reciprokan kalkulon. Boatistoj, voku ĉiujn sur la ferdekon. Debordiĝu. (Fajfado de deĵorantoj, tumulto, kurado).

PANOV — Nu, Artem, mi deziras al vi larĝan vojon, bonan ŝancon. Estu kun vi nia ŝipana sukceso.

(Ili kisas sin reciproke)

GODUN — Adiaŭ, amiketo. Diru al la komitato, ke ni ne hontigos la ŝipanan famon. Per niaj dentoj ni akiros la Sovetan liberon. (Al Tatjana) Tatjana Eŭgenjevna, grandan dankon al vi, ne nur de mi, sed de ĉiuj. Se vi nin ne avertus, ni estus pereontaj, ne alveninte Petrogradon. Grandan dankon.

TATJANA — Ne danku, Godun... Ĉu mi povis silenti pri tio...

GODUN — Bone... Se mi restos viva, ni ankoraŭ parolos. Kaj nun necesas al vi iri hejmen.

TATJANA — Ĉu mi ne povas resti sur la krozŝipo? Mi ja estas ruĝkruca fratulino, kaj mia helpo estos por vi necesa...

46 GODUN — Bone... Tatjana Eŭgenjevna.. Do restu... Dankon.

PANOV — Nu, ŝipanoj, estas tempo por adiaŭi. Ankoraŭ unu fojon — adiaŭ. Bonan vojon! (Godun akompanas Panov).

PANOV — (de la surira ponteto) Bonan ŝancon!

(Krioj: Dankon... Restu bonfarta! Akompanata de salutgestoj, la kutro fornaĝas).

BERSENEV — Levu la flagon.

(la ŝipano deligas de ŝiprando la flagŝnuron kaj komencas malrapide levi disvolvigantan carsiparan batalflagon — sur blanka kampo du kruciĝantaj bluaj strioj).

GODUN — (sin ĵetante al li) Atendu... retiriĝu malantaŭen... Al ni plu ne necesas la flago de carista ŝiparo. Nia krozŝipo plu ne apartenas al ĝi. Alportu nian flagon — la komitatan standardon. (Forŝiras la malnovan flagon kaj ĵetas ĝin trans la ŝiprando).

MALJUNA ŜIPANO — Ĝuste, Artem. Levu nian flagon... Je la memoro de Potemkin.

(Alkuras ŝipano kun ruĝa standardo. Godun ligas ĝin al flagmasto. La ŝipanoj ĉirkaŭas Godun).

BERSENEV — Pleniĝo antaŭen.

VOĈO TRANS LA SCENEJO — Laŭ ordono. Pleniĝo.

GODUN — (de la komandoponteto) Ŝipanoj, kamaradoj. Ni iras al granda militiro, al nia unua libera militiro. Militiro por nia sorto. por estonto. Ni iras rompi porterne la jugon de burĝaro. Levu nian flagon (Ruĝa flago suprenflugas kiel fajra tukpeco. Samtempe komencas labori la ŝipŝraŭboj. Aŭdiĝas ilia zumado el la ŝipa postparto).

ŜIPANO — (de la komandoponteto) Vigle antaŭen... estu al ni la Soveta registaro... Hura...

KOMUNA KRIO SUR LA TUTA KROZŜIPO: HURA... HURA!

(Kun kantado de «Internacio» la krozŝipo fornaĝas).

KURTENO

---